5-a Jaro. N-o 242 APERAS  SEMAJNE 23. Majo 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

Leipzig, la urbo de nia 9-a SAT-Kongreso

Geografio. Historia evoluo

Preskaŭ en la centro de Germanio, inter la kunfluo de tri malgrandaj riveroj Elster, Plajse (germ.: Pleisse) kaj Parthe situas Leipzig (tilia urbo), la kongresa urbo de nia 9-a. Mondfama ĝi estas pro siaj foiroj de komercaj kaj industriaj specimenoj kaj inter la Laboristaro tutmonda pro sia historia signifo kiel elirejo de la socialista movado en Germanio.

Certe la urbo mem ne povas konkurenci kun multaj aliaj de la en- kaj eksterlando koncerne al urbkonstrua aranĝo de l' stratbildo. Ĝia karaktero pli vere estas tiu de transiro de la mezepoka eksteraĵo al la moderna. Sed tiu fakto estas kondiĉita per la historio de la urbo. Ĝi estas fondaĵo de Sorboj (slava gento), kiuj ĝis komenco de l' naŭa jarcento surloĝis la ebenan parton de l' meza Germanio, kie ili okupis sin ĉe la kunfluo de la cititaj riveroj per fiŝkaptado. En la jaro 928 la Sorbaj landoj estis okupataj de la germana reĝo Henriko I. La lando fariĝis germana kolonio, kaj baldaŭ kreskis komercaj interrilatoj inter Germanio kaj ĝia nova provinco. La komuna valo de "Elster" kaj "Plajse" — vasta kaj marĉega — malpermesis norde kaj sude ĉiun transpason. Nur apud la urbo ĝi malvastiĝis kaj tiel allogis ĉiun okcident - orientan interkomunikiĝon. Ankaŭ la malnova najbara urbo Halle transportis siajn produktojn en la novan landon kaj faris novan tre uzitan straton tra Leipzig. Ankaŭ la komercistoj el la sudaj regionoj elektis sian vojon trans Leipzig. Iom post iom kreskis la influo de la urbo. Ĝi ricevis foson kaj remparon kaj tre gravajn komercajn privilegiojn. Tri foiroj venigis ĉiujare multajn vendistojn kaj aĉetantojn el ĉiuj landoj al ĝi. 120 kilometrojn ĉirkaŭ la urbo aliaj foiroj estis malpermesitaj. Alia privilegio ordonis al ĉiu vendisto, kiu proksimiĝis je 120 km., ke ili dum tri tagoj elmetu kaj proponu siajn komercaĵojn al la Leipzig-anoj.



Nova Magistrata Domo de Leipzig
(Fotografiisto: H. Walter, Leipzig. Eldonejo: Ratsnachrichtenamt. Magistrata Inform-Oficejo)

Militoj kaj milit-memoraĵoj

Kelkfoje Leipzig estis la loko de gravaj militaj okazaĵoj en la diversaj jarcentoj. Tiel en 1216, kiam regemaj princoj atakis ĝin, por devigi ĝin al obeado. Dum 1618/48 la furioza 30-jara milito verŝis multe da malfeliĉo kaj suferoj sur la urbon. Ĝi estis okupita de amiko kaj malamiko, kaj neniu donacis ion al la timigita, prirabita loĝantaro. Alternis bataloj inter la imperia militestro Tilli kaj svedaj soldataroj sub la gvido de reĝo Gustav-Adolfo kaj poste inter Vallenŝtajn kaj Gustav-Adolfo. En la jaro 1813 okazis de la 16-a ĝis 18-a de oktobro apud Leipzig granda, decida batalo interpopola. Preskaŭ unu miliono da batalantoj militis, prusoj, rusoj, svedoj, aŭstroj kontraŭ francoj kaj malgrandaj okcident-germanaj gentoj. Fine la franca imperiestro Napoleono estis venkata. Multaj monumentoj ankoraŭ nun atestas pri tiu ĉi "glora tempo"; la plej granda el ili estas la monumento de la interpopola batalo, la "ŝtonamaso", kiel ĝi estas nomata inter la Leipziga loĝantaro. Niaj legantoj certe konsentas, se mi opinias nenecese, dediĉi pli da atento al tiuj ĉi naciaj "sanktaĵoj".

Famuloj en Leipzig. La laborista movado

Pli citinda estas, ke multaj grandaj viroj, kiel la poeto Gellert, la psikologo Wundt, Lajbnic (germ.: Leibnitz)

— ankaŭ pioniro de artefarita mondlingvo — Lessing, Göte (Goethe), Ŝiler (Schiller) k. a., pasigis parton de sia vivo en Leipzig. Kiam en la dua duono de la pasinta jarcento, sekve de la transiro de metiista produktado al kapitalista industrio la laboristaro konsciiĝis pri sia mizero kaj sub la standardo de la Socialismo kontraŭbatalis la reakciularon, Leipzig ankaŭ estis la lulilo de tiu ĉi movado. Karlo Marks, Lasal (Lassalle), Vilhelmo Libkneĥt (Liebknecht), Aŭgusto Bebel, Francisko Mehring, Roza Luksemburg kaj Karlo Libkneĥt, jen estas la plej konataj nomoj el la sentima kunularo. Sed ne sendorna estis la vojo de tiuj ĉi bravuloj. Premis ilin la teroro de l' klaskontraŭuloj, ekonomia bojkoto devigis ilin forlasi la urbon, kaj dum la tempo de la "socialista leĝo"[1] 164 kuraĝaj pioniroj de la Socialismo estis perforte pelataj el la urbo. Tiel ekzemple eĉ je la "sankta vespero" de 1886 ĉe brilo de la "kristnaska arbo" kelkaj estis forpelataj de siaj familioj. Dum la jaroj, kiuj staris sub la premo de tiu ĉi esceptleĝo, socialistoj estis kondamnataj al pli ol 1000 jaroj da pundomo. Sed nenio rompis la obstinon de la amasoj kaj nuntempe la laboristaj partioj posedas la plimulton en la urba parlamento. Tre forta estas ankaŭ la sindikata movado. Je la 1. marto ĉijare estis organizataj 92 432 viroj kaj 25 136 virinoj, do sume 177 568 gelaboristoj. El ili estis senlaboraj 20 155 viroj kaj 3351 virinoj, t. e. 17,1%. Dum tiu ĉi monato pagis 20 el la ekzistantaj 34 sindikatoj subvencion al malsanuloj kaj senlaboruloj je sumo de 122 356,17 mk. g. Plej klaran bildon pri la politika situacio prezentas al ni la rezulto de la baloto por la saksa (landa) parlamento, okazinta ĵus je la 12-a de majo (lastsemajne):

Rezultoj de la baloto por la saksa landa parlamento en la urbo Leipzig

	1929	1926	1922
Socialdemokratoj	142 009	114 762	140 522
German-naciistoj	26 774	30 904	52 139
Popolpartio	81 570	63 256	101 445
Ekonomia partio	25 982	13 061	—
Komunistoj	63 025	64 368	46 095
Demokratoj	19 728	18 414	29 610
Komunista opozicio . . .	4 497	—	—
Popolrajt-partio	17 781	21 577	—
Malnovaj socialistoj . . .	4 301	14 766	—
Naciaj socialistoj (faŝistoj)	13 206	3 541	—
Centrumo (katolikoj) . . .	3 007	2 738	2 961
Saksa kamparanaro . . .	430	—	—

Laŭ tiuj rezultoj la socialdemokratoj malgajnis proporcie en komparo al la lastaj balotoj por la regna parlamento en majo 1928 kaj nur atingis 92% de la tiamaj voĉoj. La komunistoj eĉ nur atingis ĉi-foje 90%, kio estas kaŭzita pro interna krizo en la partio, kies opozicio ne sukcesis kolekti por sia propra listo la necesajn voĉojn, por okupi sidlokon en la parlamento. Krome ĉi tiu nombro pro pli forta ĝenerala partopreno altiĝis de 25 500 al 28 137, kio estas konsiderinda, por formi al si klaran bildon pri la nuna stato.

[1] Leĝo kontraŭsocialisma de Bismark.

La tutrezulto por Saksio aspektas jene:

Partioj	1929 Voĉoj	1929 Mandatoj	1926 Voĉoj	1926 Mandatoj
Socialdemokratoj . . .	922 118	33	758 142	31
German-naciistoj . . .	218 336	8	341 056	14
Popolpartio	363 417	13	292 079	12
Ekonomia partio . . .	304 353	11	237 462	10
Komunistoj	345 817	12	342 102	14
Demokratoj	115 097	4	111 311	5
Komunista opozicio .	22 594	—	—	—
Popolrajt-partio . . .	70 092	3	98 258	4
Malnovaj socialistoj .	39 625	2	98 026	4
Naciaj socialist. (faŝist.)	133 787	5	48 018	2
Centrumo (katolikoj) .	25 440	—	24 059	—
Saksa kamparanaro .	140 522	5	—	—

Niaj legantoj facile mem povas kompari la ŝanĝojn. Klarige nur estu aldonate, ke kiel proletaraj partioj nur estas konsidereblaj: socialdemokratoj, komunistoj, komunista opozicio kaj iagrade ankaŭ (laŭ la elektintaro), la malnovaj socialistoj. Tiel al 1 290 000 proletaj voĉoj kontraŭstaras 1 410 000 burĝaj voĉoj, sekve ekzistas burĝa plimulto de 120 000 erarigitaj duon-proletoj. Regos estonte en la "ruĝa Saksio" la nirgablua burĝularo. Sed venos nia tago — spite ĉio!

Jen konciza skizo pri la urbo de nia 9-a, kiu tamen ne povas anstataŭi viziton de la kongreso mem. Do preparu vin, Gek-doj, por partopreni ĝin!

DEKLARO DE LA SAT-DIREKCIO

(Daŭrigo)

En la antaŭa n-o ni citis el la gvidrezolucioj de la I-a kaj III-a Kongresoj; se ni ne domaĝus la spacon, ni povus fari similsencajn citojn el la rezolucioj de la aliaj kongresoj. Ni kontentiĝos per jeno el la lasta Kongreso en Göteborg:

"4. La Kongreso protestas kontraŭ la famaĉo, ke SAT havas **celojn politikajn.** Rilate al la politika agado de siaj membroj SAT akceptas neniun respondecon, tial ke tia agado okazas ekster la kadro de la Asocio. SAT havas ĉefe klerigajn kaj kulturajn celojn."

Per tio, kion ni citis, ĉiu lojala persono devas nepre konfesi, ke, kun la konsento de la tuta SAT-anaro, ni daŭrigas gvidadi la organizon laŭ la sama spirito, laŭ la samaj principoj, kiel ĉe la komenco. Sekve, la riproĉo, kiun oni direktas al ni pri "reviziado", estas simpla kalumnio... Ĉar oni tiom kriadas pri "reviziado", tio kredeble estas signo, ke reviziemuloj troviĝas ie. Ni ne bezonas longe esplori por ektrovi, ke ĝuste K-doj Drezen, Modenov, Breslaŭ kaj Jodko jam delonge estas mem atakataj de la emo reviziadi nian bone prosperantan SAT-entreprenon. Pruvon pri tiu nia aserto ni ĉerpos el dokumento, kiun bone konas la malnovaj SAT-anoj, kaj kiu estis eldonita kaj disdonita antaŭ la Kasela Kongreso. En tiu dokumento, kiu portas la subskribon de la supre menciitaj K-doj (krom K-do Ĵavoronkov), oni povas interalie legi jenon:

"Ni proponas:

"1. Dum la proksima kongreso de SAT — proklami aliĝon de SAT al Komintern, kaj peti la E. K. de K. I. pri laŭkonforma akcepto — — — —

"2. La titolo de SAT povas resti la sama, aŭ konforme modifita. Se E. K. de K. I. ne faros specialan pri tio decidon — — — —

"3. Pri la strukturo kaj organizo de SAT — ĝi restu la sama, nur forlasante la nenaturan laŭsektoran dividon kaj anstataŭigante ĝin per pli konforma divido laŭŝtata aŭ laŭlanda — — — —"

En alia dokumento samepoka, kiu ne portas subskribojn, sed al kies redakto tre certe ne estas fremdaj la ĉi supre menciitaj K-doj, ĉar eldonis ĝin Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, oni povas legi jenon:

"— — — — SEU kondamnas (la) ekskluzive per-esperantecan karakteron de la agado de SAT — — — — SEU ankaŭ kondamnas idealismajn principojn, kiuj estas ligitaj kun la ideo de sennaciismo. — — — Idealisma flanko de SAT forpuŝas de si ĉiujn komunistojn-marksanojn, kiuj ne povas ne vidi ĝian naivecon — — —"

Ni rezignos citi aliajn frazojn, kiuj estas tro drastaj por kelkaj tendencoj el la laborista movado.

Estus cetere preferinde lasi en polvaj paperujoj tiajn dokumentojn. Sed estas necese, ke la SAT-anaro ekkonsciu, ke se ni sukcesis ĝis nun gardi la unuecon en SAT, estas ne dank' sed malgraŭ la penoj de K-doj, kiuj hodiaŭ kulpigas nin pri reviziado kaj ŝajnigas sin kiel gardantojn de la unueco. Oni ja komparu la ĉi-suprajn citojn kun tio, kion diras en "S-ulo" de 3. januaro 1929 K-doj Drezen, Modenov, Ĵavoronkov, Breslaŭ kaj Jodko:

"Restu ĉe SAT-anoj sennaciismo kiel plej bona formo de internaciismo, restu ĉe ili la celado kontraŭ imperialismo kaj koloniaj militoj, restu celado por egalrajto de virinoj, — restu eĉ la unueca fronto, kiun malgraŭ ĉiuj artifikaĵoj de Direkciaj rimarkoj ni ĝis nun sukcesis sur bazo de nia statuto kaj de niaj klasceloj bone realigi."

Kie troviĝas la "artifikaĵoj"? Ĉu ĉe la Direkcio, kiu ĉiam penadis kun granda streĉo ebligi al ĉiuj anoj de la diversaj klasbatalaj organizoj, ke ili harmonie kunlaboru en SAT, aŭ ĉu ĉe la K-doj, kiuj celis, ke SAT aliĝu al iu politika Internacio, ke ĝi aliigu sian strukturon, ke ĝi ŝanĝu tute siajn gvidprincipojn?

La respondo al tiuj demandoj ne povas esti duba: la reviziemuloj ne troviĝas inter la Direkcianoj; la artifikuzantoj estas ĝuste K-doj Drezen kaj Ko, kiuj kulpigas aliajn pri reviziado, dum ilia ĉiama agado en SAT estis revizia.

Kaj se kelkiuj opinius, ke la dekomencaj reviziemuloj perdis sian reviziemon, ni trovos tute freŝan pruvon en plej

lastdata ruslingva libreto de K-do Drezen ("Fundamentoj de la lingvoscienco, teorio kaj historio de internacia lingvo", 1929). En la tria parto, pĝ. 13, oni povas legi: "En 1921 j., dum la XIII-a tutmonda Kongreso Esperantista en Praha 200 delegitoj de laboristaj organizoj fondis Internacian Laboristan Unuiĝon de Unueca Fronto." (?!!)[1]. La fakto, ke K-do Drezen eraras pri la nombro de delegitoj (estis 46 K-doj) ne estas esence tre grava; ĝi nur montras, ke li ne estas tre skrupula kaj ne tre zorge traesploras dokumentojn; sed ke li tiel senĝene revizias la titolon de nia Asocio, sendube montras, ke li esperas baldaŭ atingi tiun ŝanĝon de titolo. Ni ja bone scias, ke la nomo de SAT tute ne plaĉas al li!... Sed tiu fakto plej evidente montras K-don Drezen kiel ĉefrevizianton.

Kial ne sin montris plenlume ĝis nun la reviziemo de K-doj Drezen kaj Ko? Tial ke inter la komunistaj membroj de SAT mem troviĝas plimulto da sinceraj kaj klarvidaj K-doj, kiuj bone komprenis, ke tia reviziado povus esti nur malutila al la komunismo kaj al Sovetio mem. La komunistoj ĉiam havis — kaj havas — en SAT la eblon labori por siaj apartaj celoj; ili havas la eblon defendi je teoria vidpunkto siajn gvidprincipojn; ili povas utiligi — kaj gratulinde utiligas! — la SAT-aparaton por interligi laboristajn amasojn el Sovetio kun tiuj el la tuta mondo. Kion do ili povus racie postuli pli? Nenion! Sekve ni absolute ne povas kompreni la sintenon de K-doj Drezen kaj Ko. Almenaŭ ne povas esti dubo, ke ilia agado ne celas la bonon de la laborista esperanta movado, nek la verajn interesojn de Sovetio. Ni havas la profundan konvinkon, ke per nia ĝisnuna gvidmaniero ni pli utilis al la enkonduko de esp-o en komunistaj rondoj ol per la taktiko, kiun rekomendis kaj provis apliki en la pasinta tempo K-do Drezen kaj liaj sekvantoj. Ĉiuj, kiuj konas iomete la historion de la postmilita esperanta laborista movado, tiuj havas plenan konvinkon pri tio.

Ni cetere povus citi faktojn, se necesus.

* * *

[1] Paroli pri "Unueca Fronto" en SAT, tio signifas, 1. aŭ ke K-do Drezen ne komprenas ĝuste la signifon de la vortoj, kiujn li uzas, 2. aŭ ke li celas konscie konduki en nian Asocion unu el la disputpunktoj, kiuj disigas la nuntempan laboristan movadon.

a) Laŭ la historia signifo de l' vorto SAT povus fari unuecan fronton nur kun U. E. A. aŭ T. L. E. S. Tio estus granda reviziado!

b) La agitvorto "Unueca Fronto" estas lanĉita (ĵetita) de la III-a Internacio. En la komunistaj partioj mem okazis — k ankoraŭ okazas — akraj disputoj pri ĝia aplikado. Povas eĉ okazi, ke, post kelkaj jaroj, tiu agitvorto estos tute kaduka en komunistaj rondoj mem. Aliparte la II-a Internacio malkonsentas al la proponoj pri "unueca fronto", kiujn — prave aŭ malprave — ĝi konsideras kiel artifikon por krei disigon en siaj vicoj. Sekve, estas tute malprudente proponi al SAT tian politikan agitvorton.

Nia Asocio estas k restu unueca, senpartieca organizo el elementoj akceptantaj la starpunkton pri klasbatalo.

Nia gvidado de SAT kondukis ĝin al sukceso, al prospero tial ke ĝi baziĝas sur sanaj principoj de superpartieco, de intertendenca kunlaborado en plenumo de proletaj kulturtaskoj; tian gvidadon ni volas daŭrigi laŭ la sama ĝisnuna vojo. Ni volas agi lojale kaj honeste antaŭ la anarkistoj, la komunistoj, la socialistoj, kaj la granda nombro da senpartiuloj, kiuj troviĝas en SAT kaj kiuj akceptas la starpunkton de la klasbatalo. Tiu taktiko estas la sole ĝusta kaj kondiĉas la prosperon de esp-o en laboristaj rondoj tutmondaj.

Nur kiam en ĉiuj landoj la partioj mem, la sindikatoj mem propagandos kaj aplikos esp-on kaj posedos grandan aron da tre spertaj esperantistoj, nur tiam nia taktiko fariĝos kaduka. Dume ĉiu alia estus simple pereiga.

Ni parolis klare kaj nete. Ĉiu SAT-ano povas nun juĝi, kie troviĝas la reviziemuloj. Se ĉi tiuj lastaj sukcesus per trompa tendenca informado pri SAT ĉe respondecaj instancoj okazigi skismon en nia movado, ili portu antaŭ la Historio plenan respondecon pro tiu krimo kontraŭ la veraj interesoj de l'Proletaro!

Dume ni ĉesigu la disputon kaj dediĉu niajn fortojn ununure al pozitiva, praktika laboro.

Direkcio de SAT.

P. S. — Ni posedas abundan materialon por la rubriko "Diskutejo", rilatan al la programafero. Ni ankaŭ ricevis abunde leterojn de abonantoj, kiuj plendas pro tio, ke ni misuzis la paĝojn de "S-ulo" por polemikaĵoj, kelkfoje tre ofendaj, kiuj tute ne interesas la grandegan plimulton el la legantoj. Pro tiaj plendoj kaj ĉefe pro tio, ke la manuskriptoj, kiujn ni posedas, ne aldonas ion novan, ni decidis en nia kunsido de la 16. 4. 1929 ĉesigi tiun diskuton. Escepton ni tamen faru por niaj Bulgaraj K-doj, kiuj insiste argumentas, ke neniu el la blankaj landoj partoprenis la debaton. Tiuj niaj K-doj estas reviziemaj, sed ili almenaŭ ne kaŝas sian revizi-deziron.

Direkcio.

* * *

"— — — Ĉu la nuna tempo de bataloj ne montris klarege al ĉiuj, ke inter politika, sindikata kaj kultura vivo ne eblas streki klaran akran linion, kiom oni ne deziru. Kaj se ekzistas iuj, dezirantaj puran "kemie" organizon de politiko-partieco, ili iru al "neŭtraluloj", iru al diablo, iregu! Kuregu! "Bonan vojon" ni diru.

"Kiaj barbaroj!" eble diros iu. "Ili ja ne vidas, ke multiuj forlasos SAT-on." Ni kiel barbaroj respondos — Jes ni vidas, scias tion. Pli bone ili nun forkuru ol morgaŭ. Ja mem Lanti konfesas: "Sed venos sendube la tempo, kiam la sennaciistoj difinos tute precize sian vidpunkton rilate al socipolitikaj demandoj." (El Rim. 14-a, Protokolaro.) Kaj ĉu ne venis jam la tempo rilate al, ekzemple, imperialismo (el Rim. 10-a "se oni difinos al nia asocio kiel taskon batali kontraŭ la imperialismo, oni samtempe liveros al niaj kom. K-doj la rajton batali kontraŭ la socialistaj K-doj")? Ankaŭ pri faŝismo, naciaj bataloj (kondiĉe ke ni ilin subtenos por ilin fini kiel proletan revolucion). Ni ne donas iom da atento al la privirina rimarko (Rim. 12-a); tiom ĉagrena, ofenda, dum en Progr.-projekto ekzistas nur unu ne "klara" frazo.

Sed denove "Bonan vojon" al eksiĝemuloj. Eĉ se ili estas "konsciaj", "konsekvencaj" socialistoj, komunistoj, anarkistoj. Restu nur laboremaj proletoj, reveluciemuloj. Aŭ vi plendos, ploros, se diemaj "kom-istoj" el Sovetio pro nia laŭprograma ateista agado eksiĝos. Nu, iru ili al sia diabl...., pardonu, al dio sia. Aŭ pro kontraŭfaŝista, kontraŭimperialista nia agado eksiĝos la socialistoj. Sed ĉu tio estus "konscia", "konsekvenca" proleto?

Ekzemple: la nuna senprogrameco permesas al bulgaraj soc. demokratoj SAT-aniĝi — ja ili ankaŭ estas por proleta liberiĝo (kio ne malhelpis al ili ĉeesti ĉiam en burĝaj konspiroj kaj ribeloj; jam ili mem konfesis tion en la juĝejo). Kaj ĉu vi scias — tiam la nunaj SAT-anoj en B., se ili ne sukcesos eksigi ilin (la soc. dem.), ili mem eksiĝos: ni ne deziras havi ion komunan kun ili, ĉar ili neniam helpos al proleta liberiĝo.

Kaj jen al tiuj "proletoj" konsciaj (?) kaj konsekvencaj (?) ni deziras uzi la "ordonojn" de estonta programo por montri al ili la pordon de SAT-anio, por eliri. Bazante nin sur sama programo ni propagandu, pro kio devas proletaro esperantistiĝi, kaj ni montru al ĝi la vastege malfermitan pordon, tra kiu ĝi eniru SAT-on. Finante ni trumpetas: Vivu la proletaj ĉiutagaj bataloj! Vivu SAT por servi al ili!

En la nomo de ××× SAT-anoj (Bulgario).



Pagante la tre ege malaltan abonmonon por la nuntempe sola esperantista mondrevuo literatura, scienc-teknika, eduka

LA NOVA EPOKO

vi certigas al vi ĉiumonate 32-paĝan kajeron kun valora, interesa legaĵo, kiu kontentigos vin. La maja n-o jus aperis!

Unuopa kajero estas havebla kontraŭ pago de 0,35 mk. g. ĉe

Administrejo de SAT, Leipzig O 27 (Germanio)

Petu katalogon!

Fiŝkaptista movado en Kanado

Trifoje la Pacifikaj fiŝkaptistoj de Kanado provis organiziĝi por sia defendo. Ĉiufoje ili sukcesis varbi nur kelkcentojn da membroj, kaj post malmultaj jaroj la organizo formortis. Ĉefkaŭzo por organizaj malsukcesoj estis la senkondiĉa dependo de "majstroj", kiuj ĉikanis la kaptistojn per boato, reto, manĝaĵo kaj aliaj rimedoj, ofte ankaŭ per kapt-malpermeso. Laŭleĝe ĉiu civitano — ĉu kapabla aŭ ne por tio metio — povas havi la permeson kapti. Sed se la nomo de aspiranto ne aperis en listo, sendita al ŝtatoficisto de Konservejo-Kompanio, oficisto klarigis al li, ke ne utilas havi la permeson, kiam mankas perado por kaptado. Tiu civitana rajto malkaŝiĝis do kiel vestaĵo sur nuda kapitalisma devigo.

Dua, same grava kaŭzo estis (kaj estas) la internacieco de l' kaptistoj. Ĉar ĉiu civitano havas rajton por kaptado, do la kaptistoj konsistas el ĉiuspeçaj blankhaŭtuloj — ĉefe el skotoj, skandinavoj kaj finnoj — kaj indianoj, japanoj kaj kelkaj negroj.

Oni diru, kion oni volas, pri frateco kaj internaciismo; sed la fiŝkaptistoj fariĝis pro tio, ke ili izole, ĉiam por "sia propra bono" laboras, tiel dubemaj, ĵaluzaj kaj malkonfidemaj, ke ofte ili ŝajne tre proksimiĝas al spirit-malsanuloj. Ili ĉiam skeptikas kaj observas sian plej proksiman najbaron malkonfide. La sama stato ekzistas ankaŭ ĉe ĉiuj naciaj grupoj, en ĉiuj lokoj, kaj ĉe ĉiuj variaj kapt-metodoj senescepte.

Dum pasintaj jaroj okazis kelkaj strikoj, sed ĉiam ĉeestis la sento de dubemo kaj malkonfidemo, disdividiĝo, apartiĝo kaj "memstaremo". Samokaze iu grupo tute perdis sian "toleremon", altigis la velojn kaj eliris, dum aliaj ne estis tro certaj. Nura konsolo estis la espero, ke striko baldaŭ finiĝos.

Tre viva bildo prezentiĝis en pasinta jaro. La organizo konsistis el pli da anoj ol antaŭe, sed la prezo po fiŝo estis malaltigita de $ 0,52 ĝis 0,50 — simple per skribita anonco de l' kompanioj, kvankam en ĉiuj naciaj grupoj ekregis forta malkonsento. Tamen parolante al ili pri tio, ili tuj silentis, kvazaŭ diroj pri tio estus por ili plej danĝeraj. Kaj ofte, kiam alinaciano ĉesigis sian interparolon, iu el la grupo demandis per sia nacia lingvo: "Ĉu li estas "grupano", spiono aŭ simpla ofic-serĉanto?"

Depost kelkaj jaroj la plimulto da kaptistoj posedas sian boaton, kelkaj ankaŭ aliajn ilojn. Sed en lastaj jaroj la kaptado tiom malsukcesis, ke preskaŭ ĉiuj perdis pro eluzo siajn retojn. Ili devas esti renovigataj ĉiun duan jaron kaj tio kostas $ 250—320. Krom tio multaj ŝuldas al la kompanioj pro diversspecaj ricevoj, sed precipe, ĉar la kompanio garantiis krediton por ili ĉe la boatkonstruisto aŭ en maŝinfabriko. Tiuj kreditoj pro malsukcesaj sezonoj devis esti pagataj de l' kompanioj.

Dum tiaj por laborularo malfacilaj tempoj jam ofte okazis, ke ili estis devigitaj sin organizi ankaŭ en kooperativoj. En lasta julio la fiŝkaptistoj en la centra zono havis sian unuan kooperativan kunvenon, kaj nun ĝi estas leĝa afero. Kvankam la tuta kaptistaro troviĝas en mizero — ofte mankas eĉ ordinaraj manĝaĵoj, kaj ilia eksteraĵo senkaŝe parolas pri malriĉo — tamen la troa premego devigis kelkiujn viglajn iel trovi monon por akiri akciojn. Sed tio ne sufiĉas, kaj pro manko da kapitalo ni ne povas komenci konstruadon.

La tuta entrepreno eble kostas $ 40000. Ĝis nun estas rifuzitaj ĉiuj proponoj faritaj de diversaj financistoj por procente pruntedoni la kapitalon; kredeble ĉe la fino de la venonta sezono oni povos elvendi sufiĉe da akcioj.

Pere de niaj du organizoj (kooperativo kaj meti-unuiĝo) nia batalo por salajra plialtigo, kontraŭ unuigitaj majstroj pli efikas. La kooperativo, donante ekonomian subtenon en formo de ilaro kaj kreditoj, ankaŭ per aĉetado de fiŝoj, pligas proporcie je la rezultoj kuraĝon, agemon kaj membrokvanton en la metiunuiĝo. Nun ni ja povas paroli pri notinda efiko de ambaŭ organizoj kune, ĉar ni posedas skribe faritan interkonsenton inter niaj organizoj kaj kapitalistaj entreprenistoj, ke la minimuma prezo po fiŝo en venonta sezono estu $ 0,60. Ni prenu iom, dum ni preparu nin por preni ĉiom.

10 044, Sointula (Kanado).

FAKTOJ SEN KOMENTOJ

La situacio de l' intelektuloj en Japanio

Laŭ freŝdata statistiko troviĝas inter la manlaboristoj 13% da diplomitaj universitataj lernantoj, studentoj de altlernejoj aŭ duagradaj lernejoj. La eksterordinara disvolviĝo de Japanio dum la jaroj 1916/18 plenigis la universitatojn per junuloj avidaj je scio kaj je profitaj oficoj. La ekonomia krizo ĵetis ilin sur la pavimon. Ne troigante oni povas aserti, ke la situacio de l' intelektuloj en Japanio estas maltrankviliga. Publikigisto skribas, ke nur unu el cento da junaj kandidatoj sukcesas trovi okupon. La meza salajro komence ne superas tridek jen-ojn (ĉ. 15 dol.), kio estas la prezo por mezgrada pensiono (ĉambro kaj nutrado por studentoj) en Tokio. La intelektuloj havas salajrojn ofte je duono malsuperajn al tiuj de l' fabrikaj laboristoj. Multaj studentoj fariĝas aŭtomobilkondukistoj. Granda nombro da tiuj ĉi intelektuloj interesiĝas pri la laborista kaj kamparana movado kaj ĝin partoprenas. Almenaŭ ili estas partianoj de la moderaj radikaluloj gvidataj de l' profesoro Abe, sed parto inter ili estas nete komunistoj, kiuj kaŝas siajn verajn politikajn konvinkojn pro timo al la policanoj komisiitaj per la "ĉasado al danĝeraj ideoj".

Laŭ la burĝa gazeto "Le Temps" (La Tempo).

Laŭ pastra konsilo . . .

En vilaĝo ("kiŝlako") "Ĉuan-Toba" apud Samarkand sesjara knabino havis blankajn makulojn sur vizaĝo. La patro de tiu knabino turnis sin al loka pastro ("iŝan") pro konsilo. Ĉi tiu diris, ke la knabino malsanas je lepro. (Sed fakte ŝia malsano estis ne-infekta, tre disvastigita en Mez-Azio malsano nomata "pes".) La pastro instrukciis, ke oni izolu la knabinon en brutstalo. La patro konsentis plenumi tiun ordonon, ĉar li estas religiema kaj malklera mezazia vilaĝano. Post sep jaroj la sama malsano kaptis fratinon, kiun la patro same ŝlosas en brutstalon.

De tiu tempo ambaŭ fratinoj troviĝis senelire en stalo kaj ricevis manĝaĵon per longa stango tra eta truo en la muro. Tiel loĝis la pli aĝa knabino dudek-unu jarojn, la pli juna dek-kvar jarojn . . .

S. Isajev, Ivanovo-Voznesensk.

Faktoj pri Britaj Laboristinoj

La 30-an de majo okazos tra tuta Grand-Britio la parlamenta elektado, kiam, pro nova voĉdona leĝo, ĉiu 21-jara virino rajtos unuafoje voĉdoni. Pro tio la diversaj politikaj partioj nuntempe klopodas influi, kaj ofte trompi, la junulinojn por gajni la plejmulton da voĉdonoj.

La laboristinoj havas kelkajn fortajn subtenantinojn en la nuna parlamento, kiuj, okaze de reelektiĝo, daŭrigos la batalon por plibonigo de laboristinaj laborkondiĉoj. La Unuiĝo de oficistinoj jam preparis jenajn leĝ-proponojn por legado en la nova parlamento:

1. Rilate al higienaj kondiĉoj en oficejoj, -- sufiĉe da spaco, aero, lumo kaj pureco estas provizendaj. 2. Garantio de konstanta laboro al tielnomataj "portempaj oficistinoj" post sep jaroj en registara servo. 3. Sufiĉe da tempo antaŭ maldungo por trovi alian oficon kaj monsubvencion al registaraj oficistinoj maldungitaj pro kaŭzoj ekster ilia kontrolo. 4. La forigo de ofic-peristoj, kiuj havigas al senlaboraj oficistinoj laboron kaj pro siaj servoj postulas grandan monsumon kiel pagon.

Pro la nova voĉdona leĝo kelkaj milionoj da pliaj virinoj rajtos voĉdoni ĉe la venonta elektado; de tiuj ĉi ekstraj voĉdonoj tre multe dependas la sorto de la diversaj kandidatoj parlamentaj. Espereble la junaj laboristinoj estos sufiĉe viglaj por ne subteni reprezentantojn de tiu klaso, kiu ĉiutage ekspluatas ilin.

SAT-anino 11 576 (Londono).

Gek-doj! Legantoj de "S-ulo!"

Ni ankoraŭ ne estas varbintaj la

4000-an abonanton!

Restas nur iom pli ol

du monatoj

por atingi nian celon ĝis la 9-a SAT-Kongreso en Leipzig! . . . Tial, Gek-doj, varbu vi ĉiuj,

varbadu!



Plej prospera kapitalisma mastrumado en Ameriko donis kreskon de 8,7% ; dum sama tempo en Sovetio kresko estis 20%. Jen estas faktoj sen komentoj!

Stefan (3409), Ivanovo-Voznesensk.



Nova organizmaniero

Antaŭ precize unu jaro, en n-o 190 de 24. majo 1928, aperis en "S-ulo" artikolo "Instrua okazaĵo", kiu elmontris la malforton de l' laboristaro, kiu kuŝas en tio, ke ĝi ne estas organizita en skalo tutmonda. Temis tiutempe pri strikoj en "General Motors", la fama usona aŭtomobiltrusto, kiu instalis fabrikojn en multaj eŭropaj landoj kaj tie provis, parte sukcese, apliki usonajn labor- kaj kontraŭstrik-metodojn. En la komento estis dirite, ke la kapitalistoj ignoras la naciojn, kaj ke tial ankaŭ la laboristoj de unu sama trusto nepre devas organiziĝi sennaciece kaj unuiĝi tutmonde por povi venke batali.

Tiu ĉi artikolo estis represata en diversaj nacilingvaj gazetoj, kaj aperis je la 15. aprilo ĉi-jare ankaŭ en la komunista "Arbeiter-Zeitung" de Frankfurt kun la laŭvorta represo de la komentoj. Krome la redakcio aldonis jenan sian propran komenton:

"La konsiloj de la K-doj esperantistoj trovis, kiel oni scias, konkretan resonon en la 'General Motors'-fabriko Borsigvalde. Tie estas -- pri kio ni insiste memorigas — je la 5. aprilo (kiel ni siatempe sciigis) elektita revolucieme fabrik-konsilantaro kun 742 liber-sindikatanaj kontraŭ 97 faŝistaj voĉoj. La laborista konsilantaro de 'General Motors'-Borsigvalde konsistas el 10 opoziciaj laboristoj kaj 1 faŝisto. La novelektita ruĝa fabrikkonsilantaro turnos sin en alvoko al ĉiuj General Motors'-fabrikoj en Eŭropo kaj Ameriko kun la invito formi internacian revolucian batalinterligon de la laboristaroj de tiu ĉi usona aŭto-trusto..."

Kiel oni konstatas laŭ tio, la batalrimedoj de ni proponitaj en "S-ulo" trovas jam praktikan aplikon. Sekve tiu vidpunkto ne povas esti tiom utopia kaj sensenca, kiel volas kredigi al la legantoj de "S-ulo" la akraj kritikantoj de K-do Lanti, kiu en sia broŝuro "La Lab. Esperantismo" sur pĝ. 28 prezentas ĝuste tiun batalmetodon kiel plej efikan kaj trafan...

N. B.

Kie formalaperas malsameco de lingvoj, tie la naciecaj malsamecoj tendencas ankaŭ formalaperi.

A. Meje (france: Meillet).

Internaciistaj pensoj

"La Internaciismo ne estas la humiligo, nek la pereigo de la patrio ... Oni ne ĉesas esti patrioto, ekmarŝante sur la internaciisma vojo, kiu nepre kondiĉas la plenan disvolviĝon de l'homaro ... Male, la internaciistoj povas diri, ke ili solaj estas patriotoj, ĉar ili solaj havas komprenon pri la pligrandiĝintaj kondiĉoj, en kiuj povas k devas esti garantiataj la estonto k grando de la patrio, de ĉiuj patrioj, kiuj, anstataŭ esti antagonistaj, fariĝos solidaraj."

Julio Ged (france: Guesde).

El manifesto publikigita la 23-an de januaro 1893 de la Franca Laborista Partio. Estas interese rimarkigi, ke J. Ged estis konsiderata kiel reprezentanto en Francio de la marksisma skolo.

"Se iam temos pri milito, kies dependas la ekzisto de Germanio, ni ankaŭ batalos ĝis la lasta viro por defendi nian patrion, nian teron. Ĉiam k en ĉiu epoko ni batalos ĝis la lasta spiro kontraŭ ĉian provon forŝiri de Germanio la malplej etan parcelon da tero."

Bebel en sia parolado ĉe la Reichstag, la 7-an de marto 1904.

"Ĝi (La Labour Party, la Laborista Partio, aŭ Labor-Partio) restos fidela je la principo de la naciecoj, k, ĉar la politikaj landlimoj neniam povos marki kun absoluta precizo la dividon inter iu raso, iu nacio k alia, ĝi neniam ĉesos memorigi al la ŝtatoj, ke ili havas la devon trakti milde la malplimultojn, tiele, ke politika stato de ĉi tiuj lastaj plene kontentigu ilin."

Ramze Mkdonald (angle: Ramsey Macdonald), dec. 1928.

Kolektis k tradukis Herezulo.

Mi estos danka al la K-doj, kiuj bonvolos havigi al mi similajn eldirojn de aliaj aŭtoritataj gvidantoj el ĉiuj landoj. Oni bonvolu adresi tian materialon al la Redaktejo de "S-ulo".

KIO ESTAS "AEROARKTIK"?

Malmultaj Gek-doj scias ion pri nova internacia asocio, nomata "Aeroarktik". Tial mi volas en kelkaj linioj iom rakonti pri ĝi.

"Aeroarktik" estas mallongigita nomo de Internacia Asocio por esplorado de Arktiko per aerŝipoj. Tiu asocio estis fondata antaŭ kelkaj jaroj kaj nun havas



ĉ. 260 anojn el pli ol 20 landoj. La prezidanto de l' asocio estas prof. F. Nansen, fama norvega arkt-esploristo kaj ĝenerala sekretario estas Bruns, sperta ŝipestro de germana aerŝiparo. Kion konkrete celas "Aeroarktik"?

En nuna epoko unu el la plej gravaj problemoj estas antaŭdiro de vetero, ĉar de vetero dependas termastrumado, aerflugado ktp. La tuta plej kultura parto de la tero situas proksime al arkta regiono, kie ekzistas grandegaj cirkuladoj de atmosfero. Ĉi tiuj cirkuladoj influas la veteron en supre nomita parto de la tero. Se ni bone scius atmosfercirkuladojn en Arktiko kaj krom tio dependon de vetero en niaj landoj de l' vetero en Arktiko, ni povus senerare antaŭdiri la veteron. "Aeroarktik" celas organizi meteorologiajn staciojn en arktaj regionoj (sur multenombraj insuloj de Arkta maro kaj sur ĝiaj glacioj). La stacioj povas esti organizataj, se ni trovos bonan ilon por rilatigi ilin kun kultura mondo. Tian ilon ni nun havas: ĝi estas granda aerŝipo de Zeppelin (L. Z. 127), antaŭ nelonge konstruita en Germanio. Tiun aerŝipon opinias uzi "Aeroarktik".

La dua celo de l' "Aeroarktik" estas esplori kondiĉojn de flugado trans Arktikon, ĉar la plej mallongaj vojoj de Okcident-Eŭropo al Orient-Azio kaj al okcidenta bordo de Nord-Ameriko kaj krom tio de Orient-Azio al orienta bordo de Nord-Ameriko, pasas trans Arktikon. Tion oni povas bone imagi, prenante kaj rigardante terglobon. La unuaj vojoj postulas nur 6 tagojn per aerŝipo, la tria nur 4 tagojn, kiam la ordinara veturado per vagonaro aŭ per ŝipo postulas preskaŭ monaton. Tiu ĉi celo de "Aeroarktik" estas ankaŭ tre grava por homaro.

Krom tio "Aeroarktik" havas trian celon — sciencan. Arktaj regionoj estas tre interesaj je scienca vidpunkto. Uzante aerŝipon ni povas sufiĉe detale esplori tutan Arktikon.

Kiel mi supre skribis, en "Aeroarktik" kunlaboras scienculoj el pli ol 20 landoj; tial "Aeroarktik" estas vera internacia organizo kaj bona ekzemplo de internacia kunlaborado.

Gravaj por la tuta homaro celoj de "Aeroarktik" postulas de ni, SAT-anoj, moralan subtenon al "Aeroarktik". Tiu ĉi subteno de tuta SAT-anaro estos granda kultura afero.

Andreo Somov (10464), Pskov.

PRI NEDERLANDO

Sub tiu titolo aperis en n-o 239 artikolo de K-do I. F. (3398), kiun niaj legantoj certe legis kun intereso. Sed dume ni ricevis de K-do D. M. longan skribaĵon, en kiu li refutas kaj korektas diversajn malĝustaĵojn troviĝantajn en la artikolo de I. F. Pro ĝia longo ni konigas nur resumon. Red.

Oni ne devas prezenti al si la nederlandan popolon laŭ afiŝoj, flugfolioj, bildoj sur skatolnutraĵoj aŭ ilustritaj prospektoj, ĉar laŭ ili oni venas al la erara opinio, ke en Nederlando ĉiu portas lignajn ŝuojn, blankajn kufojn, vastajn pantalonojn ktp. Nur en malgrandaj partoj de la lando fiŝkaptistoj kaj kamparanoj malprogresemaj portas ankoraŭ tiun kostumon. Ke la temperamento povas dependi de la kvanto da akvo en la kanaloj, ŝajnas al mi stranga aserto. Ne la tuta lando kuŝas sub la marnivelo, sed nur 25%, ĉefe la okcidentaj provincoj Nord- kaj Sudholando, Zelando kaj Frislando. Rompo de akvomuro (digo) ne subakvigus la tutan landon, eĉ ne la 25 elcentojn sub-marnivelajn, ĉar ekzistas tre multaj endigigoj. Por la sekigo de la "Zuiderzee" oni ne fosas du grandajn kanalojn, sed nur digon trans la plej mallarĝan parton de la maro, por poste endigigi partojn de la tiel formota lago. Parto restos kiel rezervujo de sensala akvo. La "Haarlemermeer" ne estas la sola nederlanda "poldero" (t. e. senakvigita tero iama maro); la plej malnova (Bergmeer) estas formita antaŭ 1542. Torfon oni ne uzas por hejti fornojn, sed nur por bruligi karbon. La nederlandano ne nur vizitas "bierejon" (la trinkejoj nomiĝas "kafejoj") aŭ aŭskultas radion aŭ babilas pri nenio: Okazas lekcioj, politikaj kunvenoj, teatro, koncertoj, kinoprezentoj. La arkitekturo por novaj domoj nur tre malofte estas "fantazia"; ĝi estas kutime tre logika, sen ĉiuj nenecesaj ornamaĵoj. La ventmueliloj ne funkcias, elpumpante akvon el subtero en altan maron ekster la digoj, sed pumpante akvon el fosejoj, kiuj tranĉas la "polderojn", en kanalojn, riverojn aŭ lagojn, el kiuj ĝi fluas en la maron dum malalta tajdo. Laŭ statistiko mortis en j. 1925 en Nederlando (el 7366 miloj da homoj) nur 5 personoj je malario, 7265 je tuberkulozo. Ne ĝustas, ke granda elcento de l' loĝantaro estas brutbredistoj kaj florkulturistoj; laboris en 1920 en agrikulturo 23,6%, en industrio 37,7%, en komerco kaj trafiko 21,3%, en aliaj profesioj 17,4%. Kompare kun ciferoj de aliaj landoj oni konstatas, ke ĝuste Nederlando estas plej industria. Fraŭlo ne estas pleje impostata. Tiaj metodoj troviĝas ĉe Musolini, ne en Nederlando. Grandskala industrio troviĝas ne nur en du lokoj, sed en multaj provincoj kaj laŭlonge la grandaj riveroj. Koton- kaj diamant-industrioj, nemenciitaj de I. F., estas ambaŭ pli gravaj ol ĉiuj aliaj. Komerco de karbo, greno, ligno, fero, kafo estas pli gravaj ol tiuj branĉoj menciitaj de I. F. La komunista vidpunkto ne estas disvastigita, 1. pro la sufiĉa prospero de la nederl. laboristaro dank' al sindikata kaj politika organizo, 2. ĉar la tipe nederl. tendenco de sektiĝemo kreis div. kom. partiojn, kiuj senfine interbatalas kaj dum la nun finiĝanta periodo parlamenta havis nur unu deputiton.

Laŭ "La nederl. metalindustrio" (d-ro Saalfeld) ekzistis en 1922 en Nederlando
75 entreprenoj kun 400—1000 laboristoj
18 entreprenoj kun 1000—2000 laboristoj
kaj 8 entreprenoj kun 2000 aŭ pli da laborist.

En grandindustrio laboras 51% de ĉiuj laboristoj. Elektrolampa fabriko Philips funkcias kun 20 mil laboristoj. Aliaj rimarkoj de I. F. estas tre interesaj.

D. M., Hago.

La komuneco de lingvo sufiĉas por krei komunecon de kulturo k komunecon de sentoj.

A. Meje (france: Meillet).



LA 58-a DATREVENO

Funebre batas niaj koroj,
Pro venĝo tremas niaj manoj:
Ja reviviĝas rememoroj
Pri la murditaj Komunanoj.

Ĉu ni forgesu, karaj fratoj,
Pri l' burĝa ago fie-moka?
Ĉu ĉesu niaj korekbatoj
Por datreveno kvindek-oka?

Ho ne, karuloj! Ĉu ne vere —
Atakas nin dolor' tro peza,
Kaj brulas koro plej kolere
Pro la tombejo Per-Laŝeza.

Ankoraŭ regas ruzaj Tjeroj,
Pro la fi-venko plej ebriaj . . .
Sed hele ardas la fajreroj
De tiuj tagoj historiaj.

Do ni konservu tiun ardon!
Pli firme tenu en la manoj,
Pli alten levu la standardon,
De la tutmond' sennacianoj!

V. Zamjatin (4967).

Kien iras senlabora kamarado?

Iun matenon mi eniris iun manĝejon por matenmanĝo kaj trovis en unu angulo viron en ĉifonoj, ĉ. 35—38 jara, kies vizaĝo, manoj kaj piedoj estis brunnigre malpuriĝintaj. Li mendis kelkspecajn manĝaĵojn kun laŭta voĉo senpacience. Kvar tasojn da viskio, du tasojn da rizaĵo, du tasojn da fabsupo li trinkis kaj manĝis unu ovon. Post manĝo li ĵetis kelkajn minutojn rigardojn al la kontraŭa muro kaj sur la plankon, fine li ekapogis sian kapon sur la manĝotablon kaj endormiĝis.

Tagmeze mi ree vizitis la manĝejon por tagmanĝo. Ankoraŭ la malriĉa, malpura viro dormadis ĉe la tablo. Baldaŭ policano venis kun unu persono vestita laboristmaniere kaj diris ion al la mastro de la manĝejo. Mi ne povis aŭdi, kion la policano diris, ĉar lia voĉo estis tre mallaŭta, sed mi povis supozi, pri kio temis ĉe la vortoj de l' mastro. Ĉi tiu detale parolis pri la ago de la malpura viro. Baldaŭ la policano proksimiĝis al la viro kaj kriis "Vekiĝu, vekiĝu", sed la viro respondis nenion, ankoraŭ restis en dormo. Fine la policano kaptis lian kolumon kaj levis lin. Kun duonfermitaj okuloj la viro rigardis ĉirkaŭen kaj rimarkis policanon malantaŭ si, sed la viro nenion diris aŭ faris. "Stariĝu, stariĝu", la policano diris al li skuante lian ŝultron, sed la viro ne obeis la ordonon de l' policano. "Elpuŝu tiun ĉi viraĉon", la policano ordonis al sia akompananto.

Li prenis la brakojn de l' viro kaj lin starigis kaj elpuŝis eksteren. Kiam ili malproksimiĝis kelk-metrojn de la manĝejo, la viro subite eksidis sur la teron

kaj ekkuŝis. La policano kaj lia akompananto penis starigi la viron kaj forte batis liajn dorson kaj piedojn.

Nenion la viro faris al ili, nur dormetis, dum ili batadis lin. La akompananto de la policano baldaŭ alveturigis ĉaron kaj alligis la viron al ĝi kaj forportis lin supozeble al policoficejo. Sur la vizaĝo de la viro aperis senespera, soleca, malgaja rideto. Multaj stratbuboj sekvis la ĉaron kun intereso.

Nuntempe tiaj senmon-manĝantoj tre multiĝis. Ili volonte faras tian malbonan agadon kaj deziras resti en policejo. Estas grandega mizero en la mondo, ĉu ne?

Pro kio? Pro kio ili faras tian agon? Ĉar multaj senlaboruloj vagadas serĉante laboron ĉiutage, sed nenie ili trovas dungontojn. Mono pli kaj pli malmultiĝas en iliaj poŝoj kaj fine neniiĝas, sed ankoraŭ ili ne povas trovi laboron. Pro malsato ili perdas ĉion homecan, kaj unuj fariĝas ŝtelistoj, duaj almozuloj, kaj malfortaj, malsanemaj homoj sin mortigas perdinte esperon en sia vivo.

Unuiĝu, proletoj el ĉiuj landoj kaj kunbatalu kontraŭ maldungo!

Hisano Mijake (Japanio).

Laboristo vizitas vilaĝon

Mi pasigis unu semajnon en vilaĝoj Liskovo kaj Makarjevo. Liskovo nun nomiĝas "urbo" kaj estas administra centro de la Liskova distrikto. La vilaĝo troviĝas ĉirkaŭe je 100 km. for de Niŝni-Novgorod, Liskovo — sur la dekstra bordo de Volgo, Makarjevo — sur la maldekstra, unu kontraŭ la alia.

Makarjevo estas fama, ĉar la Niŝni-Novgoroda foiro havas sian originon de Makarjevo. Ĝis la komenco de l' 19-a jarcento la foiro okazadis nome en Makarjevo. Tiu vilaĝo estas "sankta loko" — pro monaĥinejo, ĉe kiu troviĝas "miraklofara" ikonego de sanktulo Makario. Malgraŭ malgranda kvanto da loĝantoj (proksimume 1400) Makarjevo havas kvin grandajn preĝejojn, kiuj prezentas grandan intereson per siaj antikvecaj aranĝoj kaj pentraĵoj. La multeco de l' preĝejoj estas komprenebla, se oni konsideras la ĉi tie okazintajn foirojn. La monaĥinloĝejoj kaj kvar preĝejoj lokiĝas interne de ŝtonmuregoj, plejparto el kiuj nun tute ruiniĝis. Dum la epoko de l' tatarmilitoj la muregoj estis bona rifuĝejo por la ĉirkaŭa loĝantaro.

Nun oni forigis la monaĥinojn kaj en la ejoj aranĝis "infan-urbeton". Parto de la ejoj estas okupita de iu kontoro. La orfoj-infanoj estas instruataj en la loka lernejo. Oni instalis maŝinojn por metiejo, kie oni instruas al la orfoj diversajn metiojn.

Liskovo havas proks. 12000 loĝantojn. Liskovanoj samkiel Makarjevanoj kulturas teron. Sed la plej ĉefaj okupoj de la loĝantaro en ĉi tiuj vilaĝoj estas: manlaborado (en M. ĉe sola lignosegejo, en L. ĉe presejo, apoteko, elektro-stacio, bier-fabriko ktp.), oficado kaj metiado. En L. estas multaj pomĝardenistoj, ĉarpentistoj, tajloroj, botistoj ktp. Multiuj el ambaŭ vilaĝoj dum la Volga-ŝipirado laboras surŝipe. En L. estas multaj komercistoj kaj komercistetoj, kiuj krom komercado en L. mem, vizitadas foirojn kaj bazarojn de ĉirkaŭaj urboj kaj vilaĝoj.

Kompreneble, la socia vivo de ĉi tiuj du vilaĝoj diferencas. Makarjevano matene ordigas sian korteton, laboras dome aŭ ĉe la segejo, prizorgas sian kampeton. Vespere li babilas, klaĉas kun najbaroj, trinkas teon (tre longe), eble akompanas per kantado ludadon de harmoniko ... kaj jen ĉio! En M. tre malofte okazas kino-prezentadoj k. s. Dume en L. kino-prezentadoj estas preskaŭ ĉiutagaj, okazas spektakloj kun dancoj, funkcias biblioteko, laboras parti- kaj komsomol (komjunul)-organizoj, sindikat-organizo ktp.

En M. nun privat-vendejojn anstataŭas du kooperativoj. En L. la komercistoj konstante kapitulacas antaŭ la disvolviĝo de kooperativismo, kaj ili ĉiam malplifortiĝas kaj malmultiĝas. Pli kaj pli ofte estas aŭdata: "Necesas aniĝi al nia kooperativo". Kaj oni aniĝas.

Dimanĉe en M. mi akceptis proponon de onklo viziti preĝejon. En granda preĝejo mi ekvidis ne pli ol 30 gepreĝantojn. Kaj inter ili estis nur unu 23 ĝis 24-jara junulo (gebubetojn mi ne konsideras). La vizaĝo de l' sola popo (sen diakono) estis kutime "longa". Li rapide finis la meson. Elirinte la preĝejon mi demandis la onklon: "Ĉu hodiaŭ tiom malmultaj preĝantoj estis okaze de l' bela vetero? Ĉu la aliaj ĝuas la naturon — fiŝkaptas, ekskursas k. s.?" Sekvis la respondo: "Nome hodiaŭ pro la bela vetero ĉeestis multaj preĝantoj. Mi rememoris frazon de l' avino: "Nenio bona nun povas esti. Nun diablo eklernas de l' homoj — ne homoj de l' diablo."

V. Piskunov (5432).



Iom pri vivo kaj laboro de vilaĝa instruisto

Ne temas ĉi tie doni plenan bildon pri la instruista laboro en Sovetio nek priskribi la sovetiajn lernejojn aŭ metodojn de nuntempa edukado en institucioj por popolklerigo, ĉar pri tio oni jam kelkfoje skribis en "S-ulo". En subaj linioj mi volas nur per kelkaj vortoj pentri ĝeneralan aspekton de l' instruisto kaj liaj lernantoj en nuntempa ukraina vilaĝo.

La hodiaŭa instruisto estas tute malsimila al tiu de l' antaŭrevolucia tempo. Instruista laboro en la nuna tempo estas treege grava kaj grandega. Antaŭ la instruisto nun staras du plej grandaj taskoj: unue — esti edukanto de l' prolet-infanaro, kaj due — esti aktiva kunlaboranto en la socia vivo kaj laboro de l' vilaĝo. Oftege la vilaĝinstruisto estas ano en vilaĝa soveto (konsilantaro) kaj en ĉiuj aliaj vilaĝaj organizoj. Li aktive partoprenas en la plej gravaj vilaĝaj aferoj, en kooperativaj unuiĝoj, en vilaĝa porlegada domo, kaj ĝenerale en la tuta politika kaj kulturkleriga agado. Ĉe vilaĝaj kunvenoj, dum kunsidoj de l' vilaĝa soveto, en gravaj politikaj demandoj ktp. la instruisto ĉiam partoprenas: li donas konsilojn, faras raportojn kaj klarigojn kaj ĉiel helpas la konstruadon de l' nova vivo en vilaĝo. Multaj instruistoj estas membroj de l' kompartio, kaj ilia laboro penetras ĉiujn kampojn de l' vilaĝa vivo. Per si mem kompreniĝas, ke instruistoj ankaŭ laboras en t. n. "likpunktoj" (vesperaj nelongtempaj lernejlecionoj por likvido de l' analfabeteco inter maturaĝaj kamparanoj).

Dum revoluciaj festoj la instruisto partoprenas en manifestacioj de vilaĝa loĝantaro kun ĉiuj siaj gelernantoj.

La lernantoj de l' nova lernejo ricevas tute alian edukadon, ol antaŭ la revolucio oni donadis al la infanoj. Estante mem malgrandaj anoj de l' laborfamilio, niaj vilaĝaj (kiel ankaŭ urbaj) geknaboj ellernas en nunaj lernejoj "la erojn de la vivo", t. e. ili ricevas ĉiujn sciojn, studante la apartajn kompleksojn[1] de l' ĉirkaŭanta ilin vivo. Ĉar la nuntempa lernejo pretigas la infanojn al laboro kaj batalo, tial la lerneja okupo ĉiam interplektiĝas kun la infana laboro.

Dank' al tio, ke la eduka sistemo en la lernejo portas en si klare esprimitan politikan karakteron, niaj infanoj eĉ en unuaj klasoj de l' laborlernejo kapablas orientiĝi en soci-politikaj demandoj. Niaj lernejaj infanoj bonege scias, kiuj ili estas kaj kiu ilin ĉirkaŭas. Ili scias, ke fremda laŭ nacieco germana aŭ franca laboristo estas ilia frato laŭ komunaj celoj kaj ideoj, kaj ke ilia "propra" enlanda burĝo estas ĉiam nur malamiko rilate al sia samlandana (samnacia) proleto. Ili ankaŭ same bone scias, kio estas imperialisma milito kaj kio estas klasa batalo. Tial en tagoj de l' revoluciaj festoj ili kun granda vervo, fiere marŝante dum ĝenerala manifestacio tra la stratoj vilaĝaj, laŭte kaj ĝoje kantas "Internacion" — sub la flirtanta lerneja ruĝstandardo.

Tiaj estas vilaĝa instruisto kaj liaj lernantoj dum la periodo de l' lerneja laboro. Somere la instruisto ankaŭ havas sufiĉe da okupo. Por ripozo li havas du somerajn monatojn, kaj trian monaton li okupiĝas en kursoj por instruistoj (tiaj kursoj estas ĉiujare aranĝataj), kie li pliriĉigas siajn sciojn en kampo de l' nuntempa pedagogia laboro k. s.

Tiel vivas kaj laboras la vilaĝa instruisto en sovetia Ukrainio. En sia hejma vivo li estas tre simpla kaj modesta. Dum libera tempo li iom vojaĝas, okupiĝas pri fizika kulturo, legas gazetojn. Inter la instruistoj estas K-doj, kiuj scias esperanton. Kvankam nia lingvo estas ankoraŭ ne tre disvastigita en la instruista medio, tamen la intereso por ĝi kreskas, kaj ĝi jam trovas inter intelektuloj ĉiam pli kaj pli da adeptoj.

Konklude mi devas noti, ke vivbezonaj rimedoj de nia vilaĝa instruisto estas ankoraŭ ne tute sufiĉaj, sed ili ĉiujare iom post iom plialtiĝas, kaj la vivo pliboniĝas laŭgrade.

J. B., s. Vaclavpol.

[1] "Kompleksoj" oni nomas la elementajn studfakojn, kiuj havas kiel bazon la observadon de l' vivo mem.

DISKUTEJO

Mi volas konservi mian nacian lingvon

Mi sentas en mia koro profundan kaj veran internacian amon, mi amas ĉiujn estulojn, mi helpas ilin ĉiam, kiam mi povas ne demandante al ili, kies popolon ili apartenas. Sed mi ankaŭ ne povas nei, ke mi amas mian naskiĝurbon kaj ke mi ne povas konsenti al fremduloj (permesu la vorton "fremdulo", kiun mi uzas laŭ komuna senco) piedpremi miajn samurbanojn, niajn morojn kaj nian lingvon.

La ideo pri la patrio, skribis antaŭ tri jardekoj F. Pi i Margall, ne havas por mi propran sencon, se ĝi ne signifas la lokon, kie mi naskiĝis, aŭ la tutan teron. Mi ankaŭ kredas la samon; mi ne amas la naciojn, sed mi amas la popolojn, mi ne estas naciano, sed mi konfesas, ke mi estas popolano. Ĉiu popolo havas proprajn morojn kaj la plejmulto el ili ankaŭ havas propran lingvon. La infaneto ne scias elparoli la vortojn kaj tiam, ho panjo! ŝi elparolas la vortojn kiel la infano: ili ambaŭ estas infanoj, ili ridas, kantas kaj ploras kune, ili estas du korpoj, sed unu sola menso kaj unu sola animo. La patrina lingvo estas la unua, kiun balbutas la filo, ĝi estas la plej amata, la plej agrabla kaj la plej bela; ĝi estas la lingvo de la panjo.

Nu, ĉu ni devas forlasi kaj forgesi la lingvon, kiun la patrino, inter karesoj kaj kisoj, instruis al ni? Ĉu ni devos lerni denove la dolĉan vorton, kiun neniu povas elparoli per du lingvoj?

Panjo! Panjo! ekkrias la infanoj alvokante sian patrinon, sed traduku ĉi tiun vorton fremdlingven, kaj ĝi perdos sian sencon, kaj neniu patrino komprenos ĝin nek la patrino mem de la alvokanto. Mia lingvo, la lingvo de mia patrino kaj miaj pragepatroj, estas sklavigata, do mi, kiu amas la liberon, ribelas; mi kiel civitano havas mian lingvon: katalunan, kaj kiel homarano: esperanton.

Ĉu vi kredas, kara leganto, ke en Barcelono ni parolas hispane? Ne! Ni parolas katalunan lingvon: ne estas sufiĉe da diktatoroj, nek da malliberejoj en Hispanio nek en la mondo; ili povas mortigi niajn korpojn, sed ne niajn cerbojn.

Kiom da popoloj estas altrudataj paroli lingvon, kiun tute ne instruas la panjoj? Vizitu diversajn sektorojn de la mondo kaj ĉie vi trovos la saman lingvan sklavecon, kian la hispana diktatoreco starigis en mia naskiĝlando. Ĉu vi kredas, ke ĉiu nacio havas unu solan lingvon? Ne! Nur en Francio estas parolataj kvar lingvoj krom la franca: bretona, itala, germana kaj kataluna. Nur per la forto de la forto estas devigate instrui al la infanoj lingvon, kiun paroli al la patrino ili hontus.

Popoloj de la mondo suferantaj la nunan lingvan sklavecon, mi vin salutas kaj samtempe proponas al vi ĉiuj la jenan devizon, jam rekomenditan de Zamenhof en sia "Letero al la diplomatio": Por ĉiu popolo sian propran lingvon kaj por la Homaro esperanton.

Milda Kataluno (13698).

Protesto

Mi protestas kontraŭ la intenco altrudi al la SAT-anaro fremdajn opiniojn. En la jarlibro ni povas legi artikolon pri "Praktikaj kulturtaskoj de SAT" de K-do M. Krjukov. Se ĝi estas presata en la jarlibro kun tia titolo, oni povas konsideri, ke ĝia enhavo estas rekomendata al la SAT-anaro por efektivigo. Sed la artikoloj kune kun la akcepteblaj tezoj enhavas ankaŭ multajn diskutindajn punktojn, kiuj neniel povas esti rekomendataj al SAT-anoj. Kompreneble ĉiu rajtas proponi, kion li deziras, sed kial personaj opinioj de K-do Krjukov havas iajn privilegiojn, mi ne komprenas.

Ne parolante pri la punktoj 1-a kaj 2-a, kiuj, ŝajne, estas akcepteblaj por ĉiu SAT-ano, mi haltas ĉe la 3-a. Kial ni devas propagandi esp-an alfabeton por ĉiuj naciaj lingvoj? Unue ĝi sen ŝanĝoj ne por ĉiu lingvo taŭgas, due mi, ekzemple, opinias, ke ĝi ne estas perfekta, kaj estonte oni, eble, verkos pli racian alfabeton. Kial ni devas uzi "sennaciecan" manieron de Krjukov por skribi adresojn, kiam ĝi tute ne estas "sennacieca", sed nur en Sovetio uzata, ne en aliaj landoj? Kial ni devas uzi manieron nomi ĉapitrojn kaj paĝojn en libroj tiel, kiel K-do Krjukov proponas? Eble, estas pli racia maniero!

Plue sekvas tute ne akcepteblaj por multaj SAT-anoj punktoj. Ekz., ĉu ĉiu SAT-ano devas "ne kultigi sporton" pro tio, ke ĝi ne plaĉas al K-do Krjukov? Multaj K-doj disputus pri tio kaj pruvus malon, ke por proletaro necesegas fizika kulturo.

Tre simple, laŭ K-do Krjukov, solviĝas demando pri lernejo de estonto. Nur necesas likvidi ĉiujn lernejojn ("anstataŭi ilin per eduko kaj instruo en kondiĉoj de ĉiutaga vivo") kaj samtempe enkonduki en lernejoj (likviditaj!) kinon — kaj ĉio estos preta! Logika recepto.

Poste K-do Krjukov atakas niajn kompatindajn mezurojn. Li volas forigi minutojn kaj sekundojn, forgesante, ke sekundo estas unu el la fundamentaj unuoj en la sistemo de mezuroj de nuntempa fiziko, nomata sistemo de CGS (centimetro-gramo-sekundo). Do bonvolu rekonstrui la fizikon ankaŭ! Same K-do Krjukov proponas sian kalendaron, ĉar la nuna ne taŭgas. Oni povas konsenti, ke la nuna kalendaro estas malperfekta kaj anstataŭigenda, sed kial la kalendaro de K-do Krjukov nepre estas la plej bona, tion mi ne povas kompreni. Ĉi tiu problemo estas tiom malsimpla kaj havas tiom da solvoj, ke ĝi devas esti pridiskutita kaj solvita de iu kompetenta komisiono. Ŝajnas, ke K-do Krjukov ne estas profeto, kies dirojn ĉiuj devas plenumi sen kritiko. Ni ne havas profetojn en SAT-anio.

Ankaŭ malbona ŝajnas la propono kripligi nomojn de metraj mezuroj. Iom pli frue K-do Krjukov aprobis enkondukon de internaciismo en lingvoj, sed tie ĉi li volas ekstermi ĝin. Kial ni devas anstataŭigi kompreneblajn por ĉiuj kaj uzatajn en scienco nomojn kiel kilogramo, kilometro, centimetro ktp. per monstraj vortoj similaj al "centonmetro", "dekmilonmetro" ktp., kies signifo estas klara nur por esp-istoj. Tio ĉi estus arbitraĵo, kaj ĉiu arbitraĵo malfaciligos lernadon de esp-o. Memoru nur, kiel malfacile estas lernata Zamenhofa tabelo: "kio, kia, kiu...", ĉar ĝi estas arbitra! Ju pli da internaciaj vortoj ni havas, des pli facile lernebla estas nia lingvo. Ne tentu vin logikeco. Tro da logiko kondukas al skolastiko, al morto, kiel ĝi okazas kun lingvo ido.

K-do Krjukov plue ne volas havi naciigitan formon de „Rosio" anstataŭ "Rusio" kaj kun tio ĉi oni povas konsenti, kompreneble ne pro tio, ke "Rusio" estas tiel nomata, ĉar en ĝi loĝas "rusoj" (tiel derivas K-do Krjukov!), sed ĉar la lasta formo estas pli internacia. Sed kial kun ŝaŭmo ĉe buŝo K-do Krjukov defendas rusigitan nomon "Sibirio", kvankam ĝi estas kontraŭfundamenta, ne internacia kaj malbela, restas ia mistero. Neniel oni povas klarigi tion alie, ol per konscia aŭ senkonscia ŝovinismo. Pro tio, ke vi loĝas en "Sibirio", ne forgesu, K-do Krjukov, pri sennaciismo, kiun vi predikas al la SAT-anaro!


Fine K-do Krjukov proponas tian sistemon nomi infanojn, kiu memorigas iajn mezepokajn mistikaĵojn, kaj estante uzata de SAT-anoj ridindigus ilin tiom, ke fine oni juĝus ilin frenezaj.

Estas tre bone, ke K-do Krjukov emas ĉion normigi, sed estas tre malbone, ke li ĉion celas normigi laŭ sia plaĉo, forgesante, ke aliaj membroj de kolektivo ankaŭ havas siajn plaĉojn. Nur kolektiva laboro povas doni ion valoran por ĉiuj SAT-anoj.

Do, mi proponas, ke aŭ K-do Krjukov reverku la artikolon kaj forigu el ĝi ĉion, kio povas elvoki diskutojn, aŭ ni opiniu, ke lia artikolo havas nur diskutan karakteron kaj sekve ne devas esti presata en la jarlibro.

S. Konovalov (641).

Por nia Distro



"Strange, depost du horoj iu deziras mustardon — kaj dume mi vidas neniun homon en la vendejo!"

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio)

La Japana Studento

Revenante iun tagon de la ludkampoj al la Ŝtata Kolegio, mi vidis, malantaŭ la gimnastikejo, unu el la studentoj, lavanta la piedojn en malvarma akvo. La plej fruaj tavoloj de venontaj neĝofaloj jam surkuŝis la pintojn de la ĉirkaŭantaj montoj — kaj eble tio estis la kaŭzo, ke kun subita ekkomprenemo mi observis la junulon. Kiaj herooj estas tiuj ĉi junuloj! Miaj ĝenaĵoj, eĉ kiel fremdulo, estas nenio kompare kun iliaj. Kaj i l i eĉ ne priparolas tiajn aferojn.

Japanujo estas lando, kiu evoluigas apartan "esprit de corps" (kunligan spiriton) ĉe la klaso aŭ profesio, al kiu homo hazarde apartenas. Tio ĉi, tre verŝajne, estas heredaĵo el la tagoj de Samaurai-a superregado. Ĉar la plej signifoplena fakto pri tiu ĉi privilegiita malnova klaso estas, ke ĝi donis pli ol "quid pro quo" (unu aĵon interŝanĝe kontraŭ alia), akceptante la kulton de apartaj mizeroj kaj abstinencoj.

Laŭ la sama spirito du apartajn kvalitojn oni supozas ĉe la studenta klaso, egale ĉe riĉaj kaj malriĉaj studentoj. Unue, eltenadi senplende vivmanieron, kiu estas ofte pli severa kaj pli rigora ol tiu de la prosperanta metiisto — kaj due, ne estimi monon, eĉ ĝis la grado de tuta nescio pri la plej simplaj komercaj valoroj.

Unu kialo de tiu ĉi kamaradeco ĉe maldolĉa vivado estas, ke Japanujo estas relative malriĉa lando, kaj tamen havas la idealon de plej bona edukado por ĉiuj, kiuj kapablas profiti ricevante ĝin. Se la edukado estus multekosta afero, tiuokaze la plimulto el tiuj, kiuj nun plenigas la Ŝtatajn Kolegiojn kaj Universitatojn, estus kondamnataj je malklero dum la tuta vivo.

Tial, la Ŝtato donas ekzemplon starigante la plej bonajn edukadajn instituciojn en la lando, de Unuagrada Lernejo ĝis Universitato. Kie oni postulas pagon, la kosto estas preskaŭ absurde malalta. La "Koto Gakko", aŭ Ŝtata Kolegio, estas por progresintaj studentoj 18—21-jaraj, kaj la kosto estas proksimume 6 funtoj anglaj (ĉ. 30 dol.) po jaro. Estas granda konkurado por viziti la Ŝtatajn Kolegiojn, ĉar ĝis nun ili estas neniel sufiĉe multnombraj por kontentigi la vastan apetiton pro la scio. Lastan jaron, ĉe "Y-Koto Gakko", 1500 junuloj el tuta Japanujo interkonkuris por 180 lokoj.

Tiuj, kiuj estas sufiĉe bonŝancaj eniri la Kolegiojn, respondas al la provizata malkara edukado per vivado laŭ plej eble malalta kosto. Ĉirkaŭe duono el ili loĝadas en la "dormejo" apartenanta al la lernejo. La ceteraj, krom kelkaj dudekoj da lokaj junuloj, loĝadas en luitaj ĉambroj. Sed kie ajn ili loĝas, la kutima vivkosto, inkluzive elspezoj por libroj, sportoj kaj plezuroj, varias inter 50 ĝis 70 ŝilingoj anglaj (12½—17½ dol.) po monato.

Tio signifas ja Spartan vivmanieron. Nenia luksa klubejo — neniaj komfortaj salonoj por ili! Unu ĉambro sufiĉas kiel studejo kaj dormĉambro — kaj tiu ne por nur unu studento, sed por du, kaj eĉ kelkfoje tri. Tielnomataj "simple-vivantoj" de l' Okcidento devus vidi ĉi tiujn studentojn, kiam je tagmanĝo ili eltiras siajn manĝetajn ladajn skatoletojn kaj ĝoje ekŝoveletas la malvarman rizon, kaj malmulton krom tio, en siajn avidajn buŝojn.

Multaj estas tiel malriĉaj, ke iliaj gepatroj ne povas havigi la malgrandan monsumon necesan por vivteni ilin eĉ laŭ tiu ĉi simpla maniero. Tial, tiuj ĉi junaj herooj akceptas parttempajn okupojn, ekz. disportadon de ĵurnaloj kaj lakto, kiuj necesigas ellitiĝon je la 5-a horo ĉiumatene.

Sekve, ne estas mirinde, ke vi apenaŭ trovos decan uniformon inter ili. Nova ĉapo kaŭzas tiom da sensacio kiel laŭmoda tondo harara aŭ sufiĉe bona botparo. Kiel piedvestaĵon, kutime ili portas la lignan "geta", specon de sandalo. Sed dum eĉ metiisto ankaŭ portas "tabi" aŭ ŝtrumpetojn ĝis la maleolo, la plej multaj studentoj, krom dum mezvintro, estas kontentaj iri kun nudaj piedoj.

Kaj, kiel ĉe la studento, kiun mi rimarkis post la gimnastikejo, ili ofte bezonas lavi la polvokovritajn piedojn. Tiucele, malvarma akvo fluanta el eksterdoma krano sufiĉas. Varmaj banoj? Jes, ili havas banejojn kun varma akvo. Oni supozas tion ĉe ĉiu en Japanujo — sed laŭ tiom malmultekosta kaj komuna maniero, kia ofendegus okcidentanon.

Tamen, dank' al la studentara kodo, ĉiuj, riĉaj kaj malriĉaj, adaptas sin senplende al la disciplino de maldolĉo kaj malriĉo. Iu studento, kiu hazarde havas sufiĉe da mono, kutime regalas malavare siajn kolegojn en kiel eble plej ampleksa mezuro — kaj estas mirinde, kiom malmulte estas necesa por krei senton de superflua riĉego. Laŭ E. H. Pickering en "Daily Herald" (Ĉiutaga Heroldo) de 28. 12. 28, trad. H. S t a y (2978).

Prostituo en Sovetio

N o t e t o j e n b l o k - n o t o

Organizaj taskoj en la batalo kontraŭ prostituo

1. Senlaboreco kaj senprizorgeco de virinoj estas ĉefaj sociaj faktoroj, kiuj estigas prostituon. Same la malbonaj rilatoj al familio (heredaĵo de cara reĝimo), malbonega seksa edukado, helpas al prostituo.

2. Sekve, ĉefaj taskoj por batali kontraŭ prostituo estas batalo kontraŭ senlaboreco kaj senprizorgeco de virinoj. Necesas batali ne kontraŭ prostituinoj, sed kontraŭ prostituo.

3. Prostituo estas nepra apartenaĵo de ĉiu klasa ŝtato. Ĝiaj radikoj kuŝas en tiuj kontraŭdiroj, kiuj ekzistas inter formoj de edziĝo kaj seksaj postuloj, je unu flanko, kaj en tiu ekonomia kaj kultura subpremo, en kiu estis virino — aliflanke.

Kruela batalo pro sia ekzistado, kiu nur dum bonaj cirkonstancoj donas al virino en burĝa sociordo eblon akiri por si sendependan socian situacion, dum malbonaj cirkonstancoj (krizoj, mortaj sezonoj k. a.) elĵetas virinon sur la fundon de l' vivo kaj devigas ŝin vendi sian korpon. Kune kun kresko de kapitalismo kreskas la armeo de prostituinoj, kiuj donas sin al burĝoj de diversaj rangoj.

4. Oktobra Revolucio en Sovetio, foriginte klasan ekspluatadon, donis liberecon al virinoj kaj devigas neniigi prostituon en USSR.

5. Sed ankoraŭ ne finfine estas neniigata prostituo en Sovetio. Diversaj ekonomiaj malfaciloj, senlaboreco, m a l k l e r e c o, nedeziro labori ktp. helpas al prostituo.

6. Profesiaj prostituinoj pereis. Virinoj, kiuj vivas nur per prostituo, nun preskaŭ ne ekzistas. Nur kelkaj dekoj ekzistas en grandaj urboj de Sovetio. Tiuj virinoj apartenas al grupo de degeneraj virinoj en psiko-fiziologiaj rilatoj. Ili estas elĵetitaj el laborula armeo eble por ĉiam. Sed ekzistas prostituinoj, por kiuj monakiro per prostituo estas help-akirado al ilia salajro.

7. Soveta registaro unue batalas kontraŭ la kaŭzoj de prostituo. Plialtigo de salajro, batalo kontraŭ senlaboreco, plifortigo de ekonomia aparato, jen estas unuaj ĉefaj taskoj. Iom post iom la registaro ilin plenumas. Aliaj taskoj por batali kontraŭ prostituo estas 1. politik-kultura laboro inter virinoj, 2. klarigo de signifo de prostituo, 3. sanitara kaj kultura laboro, kiu klarigas, ke prostituo helpas al disvastigo de veneraj malsanoj, 4. starigo de racia seksa edukado, 5. kreado por junularo de necesaj kluboj kaj infandomoj, kiuj helpas starigi normalajn seksajn interrilatojn, 6. organizado de ejoj por provizora ĉeesto de virinoj, kiuj venas al fremdaj urboj.

8. Soveta registaro same batalas kontraŭ tiuj personoj, kiuj helpas al prostituo, kiuj uzas ekonomian malegalecon de virinoj por celoj de ekspluatado por siaj ĝuoj.

9. Konkrete oni tiele batalas kontraŭ prostituo. Prostituaj virinoj hazarde kaptataj de milicio estas direktataj kune kun mizerul(in)oj, parazit(in)oj, senprizorgul(in)oj en centrajn distribu-oficejojn. Tie oni esploras ŝin de medicina, socia, psikologia vidpunktoj. Kaj tiuj el ili, kiuj bezonas kuracadon aŭ kuracedukadon por altiri ilin en laboran vivon, estas direktataj en specialajn "laborkoloniojn", invalidoj en invaliddomojn.

Viroj, kiuj estas kaptitaj kune kun virinoj, estas transdonataj al juĝejoj. Prostituinoj, kiuj malsanas per veneraj malsanoj, estas direktataj en specialajn instituciojn, kie ili estas kuracataj.

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

Malgraŭ la kreskinta amplekso de nia gazeto nia provizo je manuskriptoj ne malkreskis. Kaj tio estas bona. Kvankam eble ne ĉiun K-don ni povos kontentigi per utiligo de lia manuskripto, tamen ni ne volus rezigni je la ricevo regula, seninterrompa de multflanka informplena materialo, kiu montras la vigle pulsantan vivon en nia Asocio, la fortikan senton de kunligiteco al "S-ulo" ĉe niaj K-doj. Kaj ĝuste tio permesas al ni elekti por ĉiu n-o de nia gazeto nur ion apartan, valoran, novan, interesan. Tio gardas nin kontraŭ troa ripeto de l' samo. Certe, la temo, kiun traktas la laborularo, en sia fundo estas ĉiam la sama, ĉiam same agordita, estas raportoj pri ekonomia sklaviĝo, batalo pro liberiĝo, sociaj maljustoj — sed ĝi manifestiĝas per diversaj aspektoj kaj sub diversaj formoj. Sekve ankaŭ niaj manuskriptoj estas tiom variaj. Kompari tiujn formojn, rilatigi ilin inter si kaj laŭeble trovi sintezon kaj dedukti el ili konkludojn, estas esenca tasko de nia organo kaj — pli ankoraŭ — de ĉiu unuopa leganto. (Kompreneble idealan staton en tio ni ankoraŭ ne atingis kaj ne facile atingos; tamen ni povas enregistri signifoplenajn progresojn).

Mi aludis la ĉiaman egalecon, la unuformecon en la laboristara vivo. Tio memorigas min pri la rimarkoj, kiujn faris K-do 10089 en n-o 240 pri iuj "Tagoj". Ni petas ĉiujn "Tag"-verkontojn zorge priatenti tiun deziresprimon de nia K-do, kvankam ni tute ne intencas puŝi en fiksan, difinitan relon la verkadon kaj lasas plenan liberecon al la individua ririgardo de l' temo kaj al la persona esprimkapablo. — Necesas konstati, ke ĝuste por eviti unuformecon minacantan per tro simile verkitaj "Tagoj", ni lasis lastatempe pli grandan distancon ĉe la aperigo de l' "Tagoj" (ofte en 2 aŭ 3 sinsekvaj n-oj ne presiĝis "Tago"). Malgraŭ la 12-paĝa enhavo ni faris tion, por eviti tediĝon ĉe la legantoj, kaj tial nun ree amasiĝis ioma provizo da "Tagoj" en nia kajerujo. La verkintoj, kiuj al ni diris ion pozitivan en siaj manuskriptoj, estu certaj, ke ili ekvidos sian artikolon sur la paĝoj de "S-ulo".

Fine mi ne volas forgesi refoje atentigi niajn kunlaborantojn, ke, pro la vigla kaj laŭcela kunlaborado de multaj K-doj per originaloj, la tradukaĵoj nur en esceptaj okazoj — se temas pri speciale grava kaj interesa afero — havas ŝancon esti aperigataj.

N. B.

LA MULTKOLORAJ, ILUSTRITAJ POSTKARTOJ DE SAT

estas haveblaj ĉe la Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.



9-a Kongreso de SAT

en Leipzig (Germ.) 4.—10. aŭg. 1929

8. Listo de aliĝintoj

332	Ludwig Keil, Kirchseeon ap. München, Germanio	13 266
333	E. Jaegge, Eberswalde, Germ.	13 448
334	Wilhelm Lutz, Nürnberg, Germ.	13 869
335	Ernst Dorau, Berlin	5 438
336	J. Schiene, Warnsdorf, Ĉeĥosl.	12 768
337	Louis Angermeyr, Linz, Aŭstrio	8 400
338	Petro Podolskij, Moskvo . .	14 254
339	B. Vdovenko, Lublin, Sovetio .	13 688
340	K. Gorin-Grinberg, Moskvo . .	14 524
341	Viktor Zimin, st. Misovaja Zabajk, Sovetio	6 184
342	Elio Ŝlapentoĥ, Kiev, Sovetio .	8 745
343	Louis Nagy, Niles, Usono . .	13 286
344	Ruĝamo Bonesper, New York .	29
345	Grigorij Artemjev, Nalĉik, Sov.	1 080
346	Oskar Scheidt, Bad Kreuznach, Germanio	1 390
347	Walter Vogel, Leipzig . . .	174
348	Klara Vogel, Leipzig	913
349	W. Stertzenbach, Essen, Germ.	4 567
350	Oskar Greiner, Gera	8 427
351	Herm. Klaus, Olbersdorf, Germ.	5 783
352	A. Lehmann, Olbersdorf, Germ.	?
353	Max Paul, Strehla, Germ. . .	10 730
354	Georg Seurig, Riesa, Germ. . .	534
355	Bruno Weigert, Leipzig . . .	10 889
356	V. Kazakeviĉ, Andiĵan, Sovetio	3 716
357	S. Kudrjavicki, Dnepropetrovsk	10 262
358	Paul Laptev, St. Misovaja, Sov.	14 129
359	St. Sostavkin, Zavitaja, Sovetio	9 458
360	Roza Vikker, Moskvo	14 523
361	A. Lundström, Helsinki, Finl. .	4 207
362	Tomas Pavlik, Wien, Aŭstrio .	6 843
363	Heinrich Pichler, Wien . . .	5 338
364	S. Vinogradov, Niĵni-Novgorod	5 544
365	Otto Lübkert, Bad Oldesloe, Germanio	13 060
366	Aug. Scheel, Stuttgart, Germ. .	1 919
367	M. Seydewitz, Delitzsch, Germ.	13 213
368	Kurt Böhme, Leipzig	13 566
369	Rozo Erlacher, Morges, Svisio	11 078

Donacoj

Lutz-Nürnberg 2.— mk. g.; Artemjev-Nalĉik 6.— mk. g.; Bespalov-Krasnodar 4 — mk. g.

LA SOLIDARECA AGO DE SAT-ANOJ

Laŭ raporto en "S-ulo" pri persekutoj al nia litova K-do Riĉkus k lia mizera situacio (n-o 238), la SAT-rondo en Skoghall (Svedio) decidis monkolekti en favoro de tiu K-do. 15 svedaj kronoj estas sendataj al la suferanta K-do pere de SAT. Samtempe ĝi instigas aliajn SAT-rondojn imiti ĝian geston de solidareco k esperas, ke ne nur en tiu loko, sed tra l' mondo eĥos la frata ekzemplo montrita de niaj Zaragozaj SAT-anoj.

(13 619)

Letero-propagandilo

Letero devas esti propagandilo. Ĝi devas esti montrilo de efektiva internacia lab. kunligo, ĝi devas esti ĉie kaj ĉiel uzata. Tiun taskon starigas al si "Labesko" (lab. esp. korespondado) en Leningrado, kiam ĝi komencis sian laboron. Nun ni jam havas kelkajn spertojn k volas informi pri nia nunjare plenumita laboro.

En unua kvarono de 1929 nia espistaro korespondis kun 29 landoj; estis ricevataj 900, sendataj 1100 leteroj. Ni utiligis leterojn de esp. rondetoj, de apartaj Ĝek-doj, "Esp. Servon" k "S-ulo"n. Ni elektis plej taŭgan materialon, tradukis k multobligis ĝin. Sume 97 alsendaĵoj estis uzataj en ne malpli ol 51 laborejaj mur- k presgazetoj, kie aperis 590 leteroj el eksterlimo. Krome 70 estis laŭtlegataj per radio-ĵurnalo, 30 presataj en profunuiĝa k urba gazetaro. En Leningrada Lab. Koresp-a Konferenco ni sukcese venkis pro la kvalito de nia materialo. La ĉefgvidanto de nia lab.-kor-a movado, ĉe taga gazeto "Leningrada Vero", bone komprenis la utilon de peresp-a interligo k januare dissendis spec: leteron "Kvin jaroj sen Lenin" al 22 landoj. Rezultoj ne estis tre grandaj, sed la letero estas laŭ nia preciza scio uzita en Germanio, Aŭstrio k Danio.

Nun funkcias kunliga sekcio ĉe "Rabselkor"-fako (de lab. k kamparanaj korespondantoj). Ĝin partoprenas nia reprezentanto laŭ speciala invito de "Leningr. Vero". Nia laborplano estis aprobata k jam estas plenumata. K-do Kirilov, estro de "Rabselkor"-fako donis al ni konkretajn taskojn. Tiu organizo prizorgas k gvidas nian agadon. Por Unua de majo la redakcio dissendis leterojn al 23 landoj k ni krome sendis salutleterojn al 24 landoj. Nun ni atendas rezultojn de tiu agado. Ni mem ricevis unuamajajn salutlet. efikajn el Aŭstrio k Germanio (Münĥen k Leipzig), kiuj estis presataj k radio-disaŭdigataj. Krome ili estis sendataj al 39 laborejaj gazetoj por presigo k laŭtlego dum kunvenoj. En la tuta urbo ne estas laborulo, kiu ne scias pri la salutoj. Krome la redakcio donis apartan ĉambron, kie ni havas konstantan ekspozicion rigardatan de ĉiu lab. korespondanto.

Tiel la leterinterŝanĝo donas al nia afero influon k venkon.

P. Tilin (9310), Leningrado.

Klaskonscia SAT-ano ne portas nacian aŭ neŭtralan esperanto-insignon, sed

NUR LA SAT-INSIGNON!

Per tio, li ne nur propagandas por

ESPERANTO

sed ankaŭ por sia tutmonda organizo. Pingloj, butonoj, broĉoj — Diametro 16 mm.

Prezo: **0,80 mk. g.**

Administracio de SAT, Leipzig O 27, Colmstr. 1.

INTERNACIA INTERLIGO

La Ruĝa Sindikata Internacio disvastigas jenan alvokon por kunlaboro ĉe sia organo: "Karaj K-doj, krom sia monata organo La Ruĝa Sindikata Internacio, kiu aperas en kvin lingvoj, RSI publikigas same semajnan informan organon ilustritan, la Internacia Laborista Movado, destinita al aktivaj sindikataj kadroj, al laborejaj komitatoj, laboristaj kluboj, bibliotekoj, ruĝaj anguloj ktp. de USSR; ĝi aperas nur en rusa lingvo, sed la plimulto da tie aperigataj materialoj estas tradukataj alilingven k represataj en tuta vico da eksterlandaj revoluciaj eldonoj. Estus tre grave, ke la laboristoj el Sovetio povu, per la kanalo de tiu revuo, aŭdi la voĉojn de siaj fremdlandaj samklasanoj. Ni petas vin helpi al ni envojigi interligon kun la lab. korespondantoj de via lando, havigante al ni lab. korespondaĵojn, traktantaj iujn ajn demandojn de l' sindikata vivo, de l' lab. klasbatalo, de l' laborista vivo, de l' eduka agado ktp... Vi komprenas, ke ni devas organizi tiun interligon kiel eble plej rapide k kalkulas je vi, ke vi ne prokrastu ĉi tiun aferon k senpere per ĉiuj rimedoj provizu nin per lab. korespondaĵoj. Materialon oni sendu rekte al la redakcia adreso: M. O. I., Solianka 12, Dvorec Truda, ISR (Profintern), Moskvo (USSR)."

Certe jen bona okazo por elmontri la valoron de peresperanta korespondado! Ni opinias, ke la interesataj K-doj en ĉiuj landoj ne lasos preterpasi la favoran momenton por trafe memorigi al la instancoj en Moskvo, ke nia peresperanta laboro estas atentinda, grava faktoro. Priatentu, K-doj!

AL LA TUTMONDA INSTRUISTARO ESPERANTISTA!

Preskaŭ ĉiutage oni urĝe petas, aŭ eĉ energie postulas de mi materialon statistikan pri la temoj "esperanto en lernejoj" k "esperanto inter la instruistaro". Mi nun petas: 1. Anoncu vin kiel instruistojn esperantistajn sendante vian precizan adreson! 2. Bonvolu raporti, ĉu en via urbo aŭ vilaĝo oni (ne nur vi persone) iam ajn instruis aŭ hodiaŭ instruas esperanton en iu ajn lernejo. Skribu la nomon de la koncerna lernejo! 3. Bonvolu turni vin, se vi bezonas korespondantojn el la tutmonda kolegaro por vi mem aŭ por viaj klasoj (pro internacia korespondado de l' lernantoj) al ni!

Ni ordigos la korespondan aferon sisteme k laŭplane. Cetere ni jam kolektis la adresojn de pli ol 4000 esperantistaj geinstruistoj el pli ol 50 landoj. Ricevinte viajn sciigojn, ni kapablos aranĝi k doni konfidindan statistikon pri la supre aluditaj temoj, kiu estas nepre necesa.

Sendu la materialon al f-ino Martha Moelke, Sommerfeld, Niederlausitz (Germanio), kun kiu mi en "Kunlaborado" kun IALA, New York, k la Instituto J. J. Rousseau, Genève, zorgos pri la statistiko. Dr. Dietterle.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

GERMANIO. La subdistrikto Turingio de LEA aranĝis laŭ deziro de multaj K-doj dum pentekosto grandan renkontiĝon en la Turingia arbaro. Pri tranoktado zorgis la naturamikoj, kiuj disponigis siajn dometojn. La renkontiĝo okazis en Waltershaŭsen, k de tie estas aranĝataj jenaj ekskursoj: 19-an, akcepto k promenado en ĉirkaŭo, 20-an, ekskurso al Tabarz — Torstein — Inselsberg — Tanzbuche — Friedrichsroda — Reinhardsbrunn - W., 21-an Tabarz — Brotteroda — Trusentaler Wasserfall — Dreiherrenstein — Auerhahn, 22-an, Liebenstein, 23-an, Rennstieg — Eisenach — Gr. Hörselberg, 25-an Adiaŭa vespero. Aliĝoj (por la lastaj tagoj[1]) ĉe A. Richter, Waltershausen, Gartenstr. 11. (14 329) — **SOVETIO. Saratov.** En Veterinara Instituto ĉi-jare finlernis 3 lern., du aliĝis al SAT k abonis "S-ulo"-n. Leteroj de alilandaj studentoj (Usono, Bulg., Litovio, Aŭstrio) aperis en murgazeto k vekis intereson de l' studentaro. Pro troŝarĝiteco ĉi jare ni ne povas organizi rondeton. Dum somera libertempo multaj stud. lernos. Tagĵurnalo "Juna Leninano" volonte presigas peresp. materialon, pagante al aŭtoroj k traduk. Dum marto/aprilo ni aperigis 8 let., 2 fotojn de eksterl. korespond. S. Bojev (4858).

Ĉe la neŭtraluloj

Budapestaĵoj. Okaze de la 21-a neŭtrala kongreso la esp-istoj vizitos la tombon de l' pacifista pastro Giesswein, kiu estis fervora esp-isto. Tiuokaze estas proponite, por la pilgrimado al la tombo kunporti florojn el ĉiuj landoj de la tero — eĉ se ili dumvoje sekiĝus! Ĉu homoj por elmontri sian internaciismon ne povus trovi iom pli indajn rimedojn o! meti sur tombon "internaciajn sekigitajn" florojn?

La Budapesta kongres-komitato cirkuligas du filmojn pri la kongresurbo kun esperantaj tekstoj.

Ĉeĥoslovakaĵoj. La dua eldono de broŝuro pri la "sankta" Venceslao en esp-o jam elĉerpiĝis. Pro tio la festkomitato, konvinkita pri la efiko de peresp-a agado, eldonis esp.-lingvan oficialan bultenon kun detala programo.

4-an k 5-an de majo okazis en Praha jubileaj festoj de la "Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esp-istoj" por memori pri 25-jara disvastigado de esp-o inter ĉeĥaj blinduloj. Eldonita estis tiuokaze 5-paĝa programo en esp-a k ĉeĥa lingvoj.

[1] Ĉar ni ricevis tro malfrue la sciigon. Red.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Verda Stela. Revuo Esperantista. N-o 1. Jan./febr. Eldonejo: Heroldo de Esperanto, Köln, Brüsseler Str. (Germanio). Jarabono, por simpla eldono 0.80 mk. g., por luksa eld. 2.— mk. g. Form. 14×20 cm.

Post apero de nia recenzo pri ĉi supra revuo en n-o 239 ni ricevis de l' eldonejo la informon, ke ni rilatis nur al la 8-paĝaj specimenaj paĝoj, sed ne al la kompleta n-o. Ricevinte nun ĉi lastan, ni volonte korektas, ke tiu n-o (por jan./febr.) estas 40-paĝa. Ni konstatas, ke ĝia enhavo ne estas speciale literatura, sed pli vere felietona k ĝenerale informa; sekve ĝi nek volas nek povas konkurenci al "La Nova Epoko". Ĝi enhavas simple tiun materialon, kie ne trovas lokon en "Heroldo de E.", tamen povus same bone presiĝi en tiu lasta gazeto.

Wörterbuch-Bausteine (Vorttrezoro), eldonita de germ. esp. unuiĝo "Verda Stelo" en Praha pro honora memoro je prof. Siegfr. Lederer. 1929. Formato 16×10 cm., pĝ. 54. Prezo nemenciita.

Tiu ĉi laboro prezentas laŭalfabetan kompilon de ĉiuj esprimoj k terminoj troviĝantaj en la du germ. literaturaĵoj "Gefratoj" de Göte (Goethe) k "La Rabistoj" de Ŝiler (Schiller), kiuj, kiel konate, tradukiĝis esp-en. Ĝi celas krei tiele fundamenton por kompleta german-esp-a vortaro k povas tial esti nomata "konstruaj ŝtonoj" (laŭ la titolo, kiun donis al la verketo la aŭtoroj).

Avangardo. Perioda revuo literatura-arta. Eld. Red.: str. K. Libkneĥt n-o 5, Ĥarkov, USSR. N-o 1. Formato 23×30 cm. 56 pĝ. Dukolora kovrilo. Enhavo ĉefe ukrainlingva, parte germanlingva, resumo de l' enhavo k titolo ankaŭ en esp-o, krome versaĵo de Miĥalski en esp-o kun ukraina traduko. La revuo celas disvastigi modernan prol. arton k literaturon k bonvenigas esp. kunlaboron el tutmondo.

Afiŝo dukolora pri festo de unujara ekzistado de Esp. Societo "Stelo" en Bos. Brod (Jugoslavio) kun parolado de prof. Novljan (Zagreb) pri: "Kooperado de kulturaj nacioj."

Rud. Geist, Der anonyme Krieg (La anonima milito). Eld. Internationale

---

Socialdemokratoj!

La nacia kongreso de la franca sekcio de la II-a Internacio okazos en Nancy 9.—12. junio 1929. Por montri la utilon k praktikecon de esp-o al la delegitaro, bombardu, bombardigu la kongreskomitaton per salutleteroj de izoluloj, grupoj, sindikatoj socialdemokrataj. Sendu la salutleterojn al: K-do Doley, 7, rue de la Ravinelle, Nancy (M. M.), Francio (estro de l' kongres-komitato). Afiŝojn naciajn por propagando de esp-o k materialon por ekspozicio sendu al Lab. Esp. Grupo, Popoldomo, 2, rue Drouin, Nancy (M. M.). Respondleteron sendos la Nancia grupo socialista.

Ni ne bezonas insisti pri la graveco de nia agado k esperas, ke ĉiuj socialistoj faros sian devon.

Buchpresse, Heilbronn. Havebla ĉe Willi Schwab, Frankfurt a. M., Prächterstr. 20. Prezo broŝ. 5 mk. g., bind. 6.50 mk. g. 428 pĝ. Pri- k kontraŭmilita, kontraŭkapitalista rakonto verkita en proleta, anarko-komunista spirito (germanlingva).

Por la 9-a SAT-Kongreso

Sigelmarkoj: 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g. **Leterfolioj kun kovertoj:** 15 ekz. 0.50 mk. g. Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

Per legado vi lernas... Legu regule... Abonu la semajnan legaĵon — "S-ulo"!

NIA POŜTO

1899. — Jes, via "Tago" aperos siavice en "S-ulo".

10 149. — Ni nur prilaboras la mendojn el Sovetio post ricevo de la listoj, kiam oni sendas al ni la listojn kun prokrasto, tiam ni ne kulpas.

5448. — Kiam vi fine volas skribi viajn listojn pli klare??? — Anoncojn k redakciajn aferojn vi skribu sur aparta paperfolio k n u r sur unu flanko. Adm.

Mat. Rib. — Alvenis via letero de la 19. 3. 29 k via karto de la 19. 4. 29. Mi ĉiam kun granda intereso legas viajn skribojn. Estu nepre objektiva. Mi sendigis al vi plian ekz-on el la gazeto, en kiu aperis via artikolo. Ĉu vi ricevis? Ne malkuraĝiĝu! E. L.

265. — Ni transsendis vian proteston al la O. K. K. (Leipzig). Via artikolo pri Kassel aperos.

11 128. — Por la kliŝigo de tiaj fotoj vi devas mem pagi la prezon al nia Adm. (8 mk. g.). La kliŝo poste apartenas al vi. Se vi konsentas, sciigu nin k verku "kronikan" tekston al ĝi.

11 431. — Ambaŭ "rebusoj" estas sufiĉe malfacilaj. Sed ni provos post kelkaj ŝanĝoj utiligi ilin. Red.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. **L** = letero, **PK** = poŝtkarto, **PI** = poŝtkartoj ilustritaj, **PM** = poŝtmarkoj, **bfl.** = poŝtmarko sur bildflanko, **kĉl.** = kun ĉiuj landoj, **esp-aĵo** = esperantaĵo. **Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.**

AŬSTRIO

K-do Anton Haindl, Kopernikusgasse 23, Graz, Steiermark, dez. interŝ. PI kĉl.

K-do Johano Beliĉ, Alt-Kettenhof, n-o 5, Schwechat ap. Wien, dez. interŝ. PM, kĉl.

BELGIO

K-do C. Severins, Touwstraat, 22/1, Antwerpen, dez. interŝ. PM, kĉl, per 100 aŭ 500 specoj.

GERMANIO

K-do Friedrich Köhnke (21 j., junkomisto), Sartoriusstr. 22, Hamburg-19, dez. koresp. kun masonistoj, rusaj balalajkistoj k K-doj veturontaj tra Hamburgo al la Naŭa.

K-do Albin Tautenhahn, Amalienstr. 3, Niederhasslau ap. Zwickau i. Sa., dez. koresp. kĉl, L, PK, PI.

Atentu rusaj Gek-doj! — Kiu scias la adr. de nia K-dino Zinjo Kisolova el urbo Krasnojarsk, Siberio? Bonvolu sendi informon al: K-do W. Bierbaum, Robert-Straubehof, Grenzgraben, 59/1, Chemnitz.

HISPANIO

K-do A. Segarra, Strato Vilasar, 4, Torre, Barcelona (Sans), dez. koresp. kĉl, PI.

RUMANIO

— Kamaradoj tutmondaj! — La Arada Lab. Esp. Grupo informas vin, ke la aranĝo de la ekspozicio ne estas ebla ĝis la malfermo de la Laborista Hejmo.

SOVETIO

K-dino V. Zelenskaja, Krepostnaja, 25, Krasnodar, dez. koresp. kun geinstruistoj el ĉl. pri lerneja vivo. Resp. garantiata.

— 15 gelernantoj (14—16 j.), dez. koresp. pri gelernanta vivo en ĉl. Adr.: K-dino V. Zelenskaja, Severnaja, 59, ŝkola II st. n-o 1, Krasnodar. — Resp. garantiata.

K-do Voldemaro Ŝlogovski, str. Zandebovski per. 2, Odessa (junkomunisto-metalisto), dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj.

K-do Aleksandro Ŝeremuk, Krasnaja Sloboda, Volga Odnostorenka 4, Kazan, dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj.

K-dino Ĉugunova "Okruĵkom Komsomola", Barnaul, dez. koresp. pri politikaj, lab. k virinaj temoj, L, PK, PI, kĉl, interŝ. gaz., ĵurn.

K-do Belogorcev, str. Anatolia, 109, Barnaul, post malsaniĝo denove renovigas sian koresp-adon k interŝ. L, PK, PI, kĉl pri proleta k laborista vivo. Certe resp.

K-do P. Golicin, str. Gogola, Zavkom Ŝvejnikov, 44, Barnaul, dez. koresp. kĉl pri prol., lab. k ekonomiaj temoj. Certe resp.

K-do Krutjko "Mestkomvad", Barnaul, dez. koresp. pri kamparana vivo, impostoj, lab. k. a. temoj, L, PK, PI, PM. Resp. garantiata.

K-dino N. Sitova (18 j., kudristino), Ternovskaja, 15, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl pri vivo de ĉl. virinoj k. a. temoj.

K-dino Kl. Martinenko (17 j.), ul. Lenina, 11, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl pri vivo de gejunularo k. a. temoj.

K-do Teodoro Eremeev (fotoamatoro), B. Andronovka, 23, kv. 45, Moskvo-33, dez. koresp. kĉl pri foto k kino, L, PK, PI, fotojn. Certe resp.

— Fotorondeto dez. koresp. kĉl pri foto k kino, L, PK, PI, fotojn. Adr.: Foto Kruĵok, Klubo de Buĥarin, Taganskaja, 56, Moskvo-4.

K-do N. I. Ĉistjakov, Starosadskij per. 9, kv. 4, Moskvo, dez. interŝ. PI. Resp. garantiata.

K-do V. V. Kalaŝnikov (22 j., financoficisto), Gruzinskij per. 6, kv. 6, Niĵni-Novgorod, dez. koresp. kĉl. Gek-doj, L, PK, PI, PM, bfl., esp-aĵoj. Resp. garantiata. Skribu multnombre!

K-dino Klavdio Razinkovd, Zavitaja, Amurska okr., dez. koresp. kĉl pri ĉ, temoj, pref. kun radio-amatoroj.

K-do P. E. Blaĵko, Kloĉkovskaja ul. 1, D. P. S. N. 3, komn. 38, Ĥarkov, dez. koresp. kĉl, L, PK, PI.

K-do N. Surovcev, Grekovskaja ul. Krochmalevskij per. 9, Ĥarkov, dez. interŝ. L, PK, PI kĉl.

Adresŝanĝo. — K-do E. M. Vasilevski, Abilsaj, 15, Kustanaj, KSSR (stratŝanĝo).

K-do I. Erŝov, Dobroslobodski per. 22, kv. 2, Moskvo-66, dez. koresp. kun fotoamatoroj el ĉl. Resp. garantiata.

K-dino Ritta Keĉker (studentino), 1-j Mediniski Politeĥnikum im. Krupskoj, 4-a Graĵdanska ul. 7, Moskvo, dez. koresp. kĉl.

K-dino K. Ĵurko (25 j., instruistino), profŝkola, Nikopol, Selskoĥoz, dez. koresp. kĉl, L, PK, PI.

K-dino L. Slavinskaja (21 j., instruistino), Loŝkarivska detkolonio, Nikopol, dez. koresp. kĉl, L, PK, PI.

K-do Valentino Vasiljev, Vas. Ostr., 18, linia, 19-b, kv. 68, Leningrad, dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj.

K-do Vladimiro Maksimov (fotoamatoro), Ĉernaja Reĉka, 51, kv. 23, Leningrad-10, dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj, interŝ. fotojn.

K-do R. Mjalk, Svecnoj per. 5, kv. 18, Leningrad-40, dez. koresp. kĉl.

K-do D. Kaŝinov, Vas. Ostr., 13, linia, Klubo Jakovleva, Leningrad, dez. koresp. kĉl.

SVEDIO

K-do Einar Norman, Sturegatan, 9, Malmö, 2, dez. koresp. kĉl pri politiko, arto, literaturo k laboro.

USONO

K-do Ruĝamo Bonesper, p. a. Modern Bookshop, 350, East 81st. street, New York, City, dez. koresp. kun ekstereŭropaj Gek-doj. Certe resp.

ENHAVO:

	paĝo
Leipzig, la urbo de nia 9-a SAT-Kongreso	321—22
Deklaro de la SAT-Direkcio	322—23
Fiŝkaptista movado en Kanado	324
Faktoj pri Britaj Laboristinoj	324
Faktoj sen Komentoj	324
Socialismo — Kapitalismo	325
Nova organizmaniero	325
Internaciistaj pensoj	325
Kio estas "Aeroarktik"?	325
Pri Nederlando	326
La 58-a Datreveno	326
Kien iras senlabora kamarado?	326
Laboristo vizitas vilaĝon	327
Iom pri vivo kaj laboro de vilaĝa instruisto	327
Diskutejo	328
Por nia distro	328
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	329
Tra Esperantio	330—32
Korespondado	332

Presejo: Peuvag. Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)